

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 2

Novembro 1936

Eldonanto :  
Internacia Esperanto-Ligo,  
142, High Holborn,  
London W.C.1.

Redaktoro : Teo JUNG  
223, Harstenhoekweg  
Den Haag/Scheveningen  
Nederlando

Ĉion kio concernas  
la redakcion

## Ek al laboro !

Ni ne perdu plu vortojn, tempon kaj forton  
sed komencu freŝan agadon !

Du miliardoj da homoj estas atakotaj por nia afero.

Nia movado havas multajn malamikojn: antaŭjuĝo, superstiĉo, nekomprenejo, malbonvolo, egoismo, kaj kiel ili nomiĝas cetere. Pro tio ĝi progresas ne tiel rapide, kiel oni povus atendi pro la grandioza ideo kiun ĝi reprezentas. Sed ĉiuj eksteraj malamikoj nemulte signifas kontraŭ la internaj malamikoj, kontraŭ la malhelpantoj en nia propra tendaro: malunueco, malkonkordo, malfido, envio, troambicio, kaj tiel plu.

**Neniu eksteraj malamikoj kapablos daŭre haltigi aŭ eĉ ruinigi nian movadon kaj ideon, se nur ni mem laboros harmonie kaj konkorde en interkonsento kaj unueco.** Sed se ni malatentos tiujn elementajn virtutojn necesajn por konduki militiron kiel la nian, tiam je la fino nia afero ja certe fariĝos viktimo de l' batoj falantaj sur ĝin de eksteraj potencoj

Ke ekkonu tion la nekomprenejoj en niaj vicoj, kiuj eĉ nun, en momento de plej urĝa danĝero, ne povas silentigi sian personan malkontentecon, sian opoziciemon, sian troambicion, almenaŭ ĝis tiam, kiam nia tre difektita domo de nove estos firme starigita !

Oni krias pri *malatento al statutoj*. Eble oni pravas ke iu paragrafo estas neglektita. Tio ne devas esti. Statutoj kaj paragrafoj ekzistas por esti respektataj.

Sed imagu la jenon:

Infano, aŭ malsanulo, aŭ kriplulo,

falis en marĉon. Vi promenas sur proksima vojo. Vi vidas la akcidenton. Malfeliĉe, inter vi kaj la marĉo estas herbejo, kaj la posedanto de la herbejo fiksas sur ĝi tabulon kun averto: *Surpaŝo de la herbejo malpermesita*. Se vi atentus la averton kaj ĉirkaŭirus la herbejon, intertempe la kriplulo certe dronus. Vi do riskas malatenti la averton, per kelkaj saltoj transherbejon atingas la marĉon, eltiras la kriplulon kaj lastmomente savas lian vivon.

Hazarde, el fenestro de proksima domo, tiumomente rigardis la posedanto de la herbejo, vidis vian malatenton al la averto, protestas kaj eĉ ekprocesas kontraŭ vi...

Io simila okazis nun pri UEA. Ankaŭ tiu malsanulo, kripligita de la troa sangeltiro dum antaŭaj jaroj, falis en marĉon. Por savi ĝin — ĉar **temis jam pri ĝia vivo aŭ morto** — rapida decido estis necesa, eĉ se ĝi signifis malatenton al la averto, al iu paragrafo en la statutaro. Sed notinde estas, ke en ĉi tiu kazo la herbejo estis **posedaĵo de la kriplulo mem**, kaj ke la viro, kiu rigardis el la fenestro de la proksima domo, estis **nur unu el la kunĝantoj** de la rajtoj pri la herbejo. Krome, la viro, kiu savis la drononton, estis de la kunĝantoj **elektita por direkti la sorton de la kriplulo, por sanigi, por refortigi lin**. Do, tiu viro ja **devis havi la konfidon de la granda plimulto** de l' kunĝan-

direktu al: Teo Jung, Harstenhoekweg 223, Den Haag/Scheveningen, Nederlando. Koncerne la Administracion de E. I. oni direktu sin ekskluzive al la sidejo de Internacia Esperanto-Ligo, 142 High Holborn, London W. C. 1, Anglujo.

antoj de la rajtoj pri la herbejo; alie ili certe ne elektus lin.

Kaj, efektive, **la konfidon de la plimulto li havis**, li havis ĝin **ankoraŭ post la malatento al la averta tabulo** — tion pruvis la voĉdonado de la delegitoj; kaj **li havas ĝin ankoraŭ nun** — tion montras la **aliĝo de la plej gravaj landaj societoj al la nova universala asocio**, kiun fondi devigis la savinton la sintenado de l' menciita kunĝinto de la rajtoj pri la herbejo.

Ke ni gardu pri atento al la statutoj kaj paragrafoj — bone; tio estas necesa por bonorda laborado. Eĉ protestojn ni akceptu, kvankam en la aktuala kazo la savinto preferu meritus dankon anstataŭ proteston, pro sia kuraĝa decido. Sed ni **evitu absurdigon**. Statutojn ni respektu sed ne levu sur idolan piedestalon, adorante ilin fetiĉmaniere. Koncerne nian movadon — ne malutilas ripetadi ĝin — temis pri vivo aŭ morto, kaj **nia universala asocio vivu preferere en Londono**, aŭ kie ajn, **ol ke ĝi mortu en Ĝenevo**. Eble, nun, oni sciis vivteni ĝin ankaŭ en Ĝenevo, sed nun estas jam tro malfrue. Do, ni ne perdu plu vortojn, tempon kaj forton per protestoj, procesado kaj interbatalado. **Ni komencu freŝan laboron**. Vintro staras antaŭ la pordo. Sezono de propagando kaj kursoj rekomenciĝis. **Du miliardoj da homoj-fratoj sur la terglobo estas atakotaj por nia afero**. Grandega laborkampoj! Ni semu kaj semu, por ke ju pli baldaŭ des pli volonte ni povu rikolti

**Ek al laboro!**

# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: 142, High Holborn, London W.C.1, Anglujo

## Oficiala Informilo

N-ro 2. 5 Oktobro 1936.

### Starigo.

La starigo de la nova internacia organizaĵo ricevis eĉ pli bonan akcepton ol ni atendis, kaj ni jam ricevis amason da gratuloj kaj aliĝoj. La oficejo bone funkcias, kaj kredinde antaŭ la apero de ĉi tiu Informilo en nia semajna organo la unua numero de nia monata organo **Esperanto Internacia** estos aperinta.

### Komitato.

Jam konsentis funkcii en la Provizora Komitato la jenaj personoj:

#### Prezidanto.

Generalo L. Bastien.

#### Estraro.

Generalo L. Bastien.

E. Malmgren, Nederlando.

H. Steiner, Aŭstrujo.

#### Komitato.

Generalo L. Bastien.

P. W. Baas, Nederlando.

P. Blaise, Britujo.

D-ro G. Canuto, Italujo.

D-ro J. Couteaux, Francujo.

E. Dahl, Svedujo.

R. Dubois, Francujo.

P. Hendriks, Nederlando.

Rollet de l'Isle, Francujo.

Rektoro Sam Jansson, Svedujo.

B. Long, Britujo.

E. Malmgren, Svedujo.

Prof. St. Minkov, Bulgarujo.

A. C. Oliver, Britujo.

P. Petit, Francujo.

H. Steiner, Aŭstrujo.

### Landaj Asocioj.

Krom la Brita Asocio, jam aliĝis la Aŭstria Esperanto-Asocio, kaj post la kompletigo de kelkaj formalaj aliĝoj la Asocioj en Francujo, Nederlando kaj Svedujo. La aliaj Asocioj nun pritraktas la aferon, sed laŭ sciigoj jam ricevitaj, ŝajnas, ke preskaŭ ĉiuj aliĝos.

### Honoraj Membroj.

Konsentis akcepti Honoran Membrecon en IEL la jenaj personoj:

P. Blaise, Morden, Anglujo.

W. B. Currie, Burnley, Anglujo.

E. Deligny, Saint-Omer, Francujo.

A. Humez, Douai, Francujo.

W. M. Page, Edinburgh, Skotlando.

### Dumvivaj Membroj.

Konsentis esti Dumvivaj Membroj:

F-ino E. M. Bartholomew, Letchworth, Anglujo.

F-ino F. M. Bartholomew, Letchworth, Anglujo.

W. Bayes, Hove, Anglujo.

C. van Doorne, Hillegersberg, Nederlando.

C. Gila, Locarno, Svisujo.

S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.

J. T. Holmes, Torquay, Anglujo.

J. J. W. Huysman, Etterbeek, Belgujo.

D-ro P. W. Meihuizen, Arnhem, Nederlando.

H. N. Nowell, Sandwich, Anglujo.

### Patrono.

Aliĝis kiel Patrono:

F. O. Lechmere-Oertel, Rio de Janeiro.

### Ĉef-Delegitoj.

Ankaŭ konsentis esti Ĉef-Delegitoj por IEL: Danujo: M. Palsberg.

Francujo: C. Rousseau.

Nederlando: P. H. Mooij.

### Delegitoj.

La dua listo:

*Aberdeen.* — D: D. Christie, 20, Osborne Place.

*Accrington.* — D: H. E. Roberts, 1, Owen Street.

*Ashford.* — D: A. Batt, 4, Hillyfield Road.

*Banbury.* — D: S-ino M. C. Gillett, The Elms.

*Barrow-in-Furness.* — D: J. F. Yeomans, 115, Oxford Street.

*Barry (Glamorgan).* — D: F-ino E. Baldwin Smith, 61, Porthkerry Rd.

*Bathgate (West Lothian).* — D: W. A. Gibson, Rowanbank.

*Bedford.* — D: W. Janes, 107, Kimbolton Rd.

*Bexhill-on-Sea.* — D: F-ino L. F. Whiteman, 39, Sackville Road.

*Bournville.* — D: F-ino V. Nixon, 183, Woodlands Park Road.

*Brightlingsea.* — D: C. B. Morgan, 41, Church Road.

*Bristol.* — D: J. Turnbull, 82, Stokes Croft.

VD: J. R. Evens, 22, St. Ladoc Road, Keynsham.

*Bromley (Kent).* — D: S. E. Bellatti, 334, Pickhurst Rise, W. Wickham.

*Burnley.* — D: W. B. Currie, 6, Stephenson Street.

*Cheltenham.* — D: W. M. Appleby, 32, Clarence Street.

*Chester.* — VD: J. W. Dobson, 27, Brook Str.

*Cleethorpes.* — D: T. W. Gayfer, 179, Clee Road.

*Colchester.* — D: C. Barnes, 39, Athelstan Rd.

*Corsham (Wiltshire).* — D: H. Spackman, 69, Priory Street.

*Crewe.* — D: E. Lee, 6, Gatefield Street.

*Croydon (Surrey).* — D: E. K. Jayne, 162, Orchard Way, Shirley.

*Darlington.* — D: G. Mell, 3, Banklands Rd.

*Deal (Kent).* — D: H. Sewell, The Wellings, Southwall Road.

*Derby.* — D: L. A. Churchill, 225, St. Thomas Road.

*Doncaster.* — D: J. Farrand, 22, Buckingham Road.

*Douglas (Isle of Man).* — D: T. P. Fargher, «Greeba», Park Avenue.

*Dunfermline (Fife).* — D: G. B. Hunter, 60, Dewar Street.

*East Molesey (Surrey).* — D: S-ino E. M. Kendrick, 33, Spencer Road.

*Exeter.* — D: R. W. J. Norton, 84, The Broadway.

*Harold Wood (Essex).* — D: T. J. Howell, Shirley Mount, Gubbins Lane.

*Hastings (Sussex).* — D: J. J. Boutwood, Holland House, Laton Road.

*Ipswich (Suffolk).* — D: F. D. Murphy, 54, Constable Road.

*Kettering.* — D: A. E. Smith, 20, Queensberry Road.

*Letchworth (Herts.).* — D: F-ino F. M. Bartholomew, 154, Wilbury Road.

*London (S.E. 17).* — VD: A. M. Macquarie, 116, Chatham Street.

(S.E. 26). — VD: W. J. Downes, 11, Cator Road.

(S.W. 12). — VD: F-ino A. L. Borel, 20, Badminton Road.

(W. 5). — VD: S-ino E. Nicholson, 33, Woodfield Crescent.

(Aviado). — FD: M. Lewin, 30, Blenheim Gardens, N.W. 2.

(Loĝado). — FD: C. H. Bingham, 5, Burlington Road, N. 10.

(Vojaĝo). — FD: M. M. Du Merton, 49, Derwent Road N. 13.

*Luton.* — D: R. Brash, 12, Stockwood Crescent.

*Margate.* — D: J. B. West, Briar Cottage, St. Peters Road.

*Neath (Glamorgan).* — D: F-ino M. Jones, Bryn Cerdd, Seven Sisters.

*Nottingham.* — VD: T. G. Briggs, 34, Maitland Road, Woodthorpe.

*Oban (Argyllshire).* — D: W. T. Samuel, 4, Strathaven Terrace.

*Ovingdean (Sussex).* — D: A. J. H. Hulme, Eagle's Way, Beacon Hill.

*Peebles.* — D: J. F. Souter, 49, Neidpath Rd.

*Perth.* — D: J. J. Robertson, 40, Tay Street.

*Portsmouth.* — D: M. Cowan, 40, Tudor Crescent, Cosham.

VD: W. H. Bow, 41, Kirby Road, North End.

*Rochdale.* — D: T. Woolfenden, 20-26, Cheetham Street.

VD: A. W. Robertson, 27, Chaseley Road.

*Saffron Walden (Essex).* — D: F-ino F. D. Priestman, Friends' School.

*St. Andrews (Fife).* — D: J. T. Haxton, Roakey.

*Salford.* — D: W. Joynson, 63, Cavendish Rd.

*Saltcoats (Ayrshire).* — D: R. G. Paton, «Arnvido», Sharpill Road.

*Sandwich (Kent).* — D: H. N. Nowell, St. Mildred's House.

*Scarborough.* — D: S. D. Brook, 7, Scholes Park Avenue.

*Sheffield.* — D: G. W. Roome, 21, Glenalmond Road, Sheffield 11.

VD: C. W. Gardner, 188, Meadow Head, Sheffield 8.

*Shrewsbury.* — D: T. Griffiths, 20, Wood Street.

*Southall (Middlesex).* — D: H. G. Wells, 3, Clear View, Havelock Road.

*Southampton.* — D: B. E. Lawrence, 69, Deacon Road.

*Southend-on-Sea.* — VD: F-ino G. H. Moxon, 43, Sandleigh Road, Leigh-on-Sea.

*Southsea (Hampshire).* — D: W. W. Hide, 144, Devonshire Avenue.

VD: F-ino M. E. Moss, 23, Taswell Road.

*Stevenston (Ayrshire).* — D: R. Stevenson, 15, Mayville Street.

*Swindon.* — D: L. A. Farr, 93, Croft Road.

*Torquay.* — D: J. T. Holmes, La Nia, Barnfield Road, Livermead.

*Welwyn Garden City (Herts.).* — D: F-ino A. D. George, 17, Melbourne Court.

VD: C. G. Chinn, 41, Digswell Road.

*Whitworth (Lancashire).* — D: F. W. Shaw, «Mount Ebor», Broadley.

*Worcester.* — D: W. Severn, 40, Bromyard Road.

*Worthing (Sussex).* — D: T. L. C. Bluett, South View, Chesswood Road.

*Douai (Nord).* — D: A. Humez, 133-ter, Rue Morel.

VD: C. Warusfel, 61, Rue de l'Abbaye-des-Près.

### Irlando.

*Dublin ((Irish Free State)).* — D: F. McCormick, 5, Mount Eden Road.

### Kotizoj.

Pro la subita forlaso de la orbazo, necesas aliĝoj de la kotizoj en kelkaj landoj. Personoj en la koncernaj landoj bonvolu noti la jenan novan tarifon:

MJ: 2. MA: 5. MAH: 9. MS: 12.50.

Patrono: 50 guldenoj.

**Svislando.**

MJ: 5. MA: 11. MAH: 21. MS: 25.  
 Patrono: 100 frankoj.  
 Aliaj ŝanĝoj estos anoncataj.

Cecil C. GOLDSMITH,  
 Generala Sekretario.

**Oficiala Informilo**

**N-ro 3. 13 Oktobro 1936.**

**Oficejo.**

La Oficejo normale funkcias, kaj ĉiutage alvenas amaso da novaj aliĝoj. La unua numero de **Esperanto Internacia** jam aperis, kaj ni esperas, ke ĝi kontentigos ĉiun. Notu, ke ni sendis ĝin al ĉiu membro, sed estonte ĝi estos sendata nur al tiuj, kiuj pagis la kotizon kiel MA aŭ MS por 1937. Ili ricevos la revuon de Oktobro 1936 ĝis Decembro 1937 por la unuara kotizo.

**Komitato.**

Lastatempe aliĝis al la Provizora Komitato: Francisco Azorin Izquierdo, Hispanujo.

**Landaj Asocioj.**

Aldone al la antaŭa informo, jam kunlaboras, kaj baldaŭ oficiale aliĝos, la Landaj Asocioj en Danujo, Francujo, Italujo, Nederlando kaj Svedujo.

**Honoraj Membroj.**

Aldone al la antaŭa listo:  
 A. C. y Bosque, Alcira, Hispanujo.  
 S. La Colla, Roma, Italujo.  
 E. Gasse, Le Havre, Francujo.  
 M. Rollet de l'Isle, Paris, Francujo.  
 S-ino M. Petit, Dijon, Francujo.  
 H. Steiner, Wien, Aŭstrujo.

**Dumvivaj Membroj.**

Aldone al la antaŭa listo:  
 D-ro W. Dietl, Baden bei Wien, Aŭstrujo.  
 J. Ginsburg, Antwerpen, Belgujo.  
 W. H. Harris, Lempeter, Kimrujo.  
 E. B. Johnson, Guildford, Anglujo.  
 S-ino M. Petit, Dijon, Francujo.

**Ĉef-Delegitoj.**

Novaj kunlaborantoj estas:  
 Aŭstrujo. — ĈD.: G. Weber, Internacia Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I.  
 Litovujo. — ĈD.: Liudas Alseika, Ukmergė, Zemtvark.  
 Portugalujo. — ĈD.: J. Saldanha Carreira, Ave. Duque de Loulé 50/III, Lisboa.

**Delegitoj.**

La tria listo:

**Britujo.**

*Bishop Auckland.* — D: F-ino A. B. Edwards, 10, Ladysmith Street.  
*Blackpool.* — D: R. Kenworthy, 14, Mayfield Avenue.  
*Bootle.* — D: J. Baxter, 29, Wellfield Road, Liverpool 9.  
*Burntisland.* — D: J. Rodger, Rossend Castle. VD: F-ino E. Anderson, The Grange.  
*Burton on Trent.* — D: J. C. Armstrong, 321, Burton Road, Woodville.  
*Cambridge.* — D: T. E. Collier, 19, Panton Street.  
*Chesterfield.* — D: H. Ingham, 21, Avondale Road.  
*Edinburgh.* — D: D. R. Tullo, 34, St. Andrew Square. VD: R. J. Verth, 49, Kirkhill Road.  
*Glasgow.* — D: J. B. Horne, 235, Onslow Drive, E.I.  
*Guildford.* — D: E. B. Johnson, «La Espero», Byrefield Road, Stoughton.  
*Hull.* — VD: C. E. Jacklin, 128, Marlborough Avenue.  
*Keighley.* — D: F. C. Rhodes, «Elderthorpe», Oakworth.

*Kingston (Surrey).* — D: F-ino E. A. Jones, 17, Knights Park.  
*London, N.W.6.* — VD: F. C. Midas, 39, Kings Gardens.  
*Mansfield.* — D: T. B. Rogers, «Kenwood», Alexandra Avenue.  
*Newcastle-on-Tyne.* — D: A. R. Fairbairn, Burnaby Lodge, Ryton-on-Tyne.  
*Oldham.* — D: C. Bardsley, 42, Westbourne Street.  
*Romford (Essex).* — D: W. J. R. Jolley, 22, Cranham Road.  
*Ro'herham.* — D: E. Gardiner, 49, Goodwin Avenue, Rawmarsh.  
*Royston (Herts).* — D: J. Course, High Street.  
*Wallsend.* — D: C. J. F. Kinge, «Brandwood», Weardale Avenue.

**Estonujo.**

*Valga.* — D: P. Ernits, V. Sepa 2.

**Francujo.**

*St. Omer (Pas-de-Calais).* — D: E. Deligny, 4, rue Allent.

**Hispanujo.**

*Córdoba.* — D: F. Azorin, Claudio Marcelo 18.

**Hungarujo.**

*Békés.* — D: Prof. B. Török, V., Csabai-utca 16 sz.  
*Lónya (Szabolcs).* — D: D-ro A. Hagymásy.  
*Pesthidegkút (Pest).* — D: G. Némethy, Remetékertvaros, Mátyás kir.-ut. 14.  
*Rákoshegy (Pest vm.).* — D: E. Kirschbauer, Gr. Csáky u. 23.

**Rumanujo.**

*Craiova (Oltenio).* — D: F. Szemrédi, Calea Unirei 144.

**Usono.**

*Altoona (Pennsylvania).* — D: D-ro L. E. McKee, 1104, 13th Avenue.  
*Altoona (Pennsylvania).* — D: D-ro L. E. McKee, 1104, 13th Avenue.

**Patronoj.**

Bonvolis aliĝi kiel Patrono:  
 (2). T. J. Gueritte, London, Anglujo.

**Membro-Subtenantoj.**

Aliĝis kiel membro-subtenantoj:  
 1. G. W. Roome, Sheffield, Anglujo.  
 2. C. W. Gardner, Sheffield, Anglujo.  
 3. F-ino M. Jones, Neath, Kimrujo.  
 4. H. Davies, Manchester, Anglujo.  
 5. F-ino A. L. Borel, London, Anglujo.  
 6. A. C. Oliver, London, Anglujo.  
 7. J. W. Holland, Leighton Buzzard, Anglujo.  
 8. H. Ingham, Chesterfield, Anglujo.  
 9. F-ino A. B. Edwards, Bishop Auckland, Anglujo.  
 10. C. A. Baker, Bath, Anglujo.  
 11. F-ino E. Evans, Bangor, Kimrujo.  
 12. W. Davies, Swansea, Kimrujo.  
 13. M. H. Catalano, San Isidro, Argentino.

**Kotizoj.**

Pro ŝanĝoj en la landa valuto, necesas aliĝoj en kelkaj kotizoj, kaj jen novaj ciferoj por tiuj landoj:

**Grekujo.**

MJ: 115. MA: 280. MAH: 540. MS: 700.  
 Ent.: 280. Patrono: 2500 dr.

**Italujo.**

MJ: 18. MA: 45. MAH: 90. MS: 135.  
 Ent.: 45. Patrono: 460 liroj.

**Latvujo.**

MJ: 5. MA: 12.5. MAH: 24. MS: 32.  
 Ent.: 12.5. Patrono: 125 latoj.

Aliaj ŝanĝoj estos anoncataj.

Cecil C. GOLDSMITH,  
 Generala Sekretario.

**Oficiala Informilo**

**N-ro 4. 21 Oktobro 1936.**

**Oficejo.**

Oni nun pretigas la belan domon donacitan al nia Ligo, kaj kiel eble plej baldaŭ ni publikigos bildon de ĝi. Kredeble ni povos eniri ĝin je la fino de Novembro, sed ni anoncos ĝustatempe la precizan daton de la translokiĝo kaj donos la novan adreson.

**Komitato.**

Novaj aliĝoj al la Provizora Komitato estas:  
 K. Th. Hansen, Danujo.  
 J. R. Scherer, Usono.

**Landaj Asocioj.**

Oficiale aliĝis:  
 Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

**Honoraj Membroj.**

Aldone al la antaŭaj listoj:  
 L. Bouvier, Poix, Francujo.  
 A. Kudela, Belkovic, Ĉeĥoslovakujo.  
 A. Martin, Mâcon, Francujo.  
 D. E. Parrish, Los Angeles, Usono.  
 D-ro A. Stamatiadis, Athenai, Grekujo.

**Dumvivaj Membroj.**

Aldone al la antaŭaj listoj:  
 Prof. Armando Camuffo, Trieste, Italujo.  
 C. M. Cather, Port Said, Egiptujo.  
 M. Fréchet, Paris, Francujo.  
 F. Hrzcel, Schaffhausen, Svisujo.  
 H. Huttin, Bourg en Bresse, Francujo.  
 M. Rollet de l'Isle, Paris, Francujo.  
 M. Lukas, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.  
 D. E. Parrish, Los Angeles, Usono.  
 D-ro C. Vörös, Sátoraljaujhely, Hungarujo.

**Ĉef-Delegitoj.**

Novaj kunlaborantoj estas:  
 Usono. — ĈD: D. E. Parrish, 328, W. 46th Street, Los Angeles, (California).  
 Nederlando. — V-ĈD: J. Ravestein, Pomona-laan 55, Den Haag.

**Delegitoj.**

La kvara listo:

**Britujo.**

*Chester.* — D: D. Williams, 25, Sefton Road, Hoole.  
*Chichester.* — D: W. J. Morey, 38, Washington Street.  
*Haslingden (Lancs).* — D: F-ino E. Berry, 325, Blackburn Road.  
*Ilford (Essex).* — D: C. Veness, 70, St. Andrews Road.  
*Liverpool.* — D: H. F. S. Ashworth, 265, Upper Frederick Street.  
*London.* — FD (Farmacio): C. A. Barnes, 199, Rushey Green, S.E.6.  
*Partick-Glasgow.* — D: F-ino A. G. MacFarlane, 314, Dumbarton Road, W.I.  
*Reading.* — D: G. L. Preedy, Caer Glow, St. Andrews Road, Caversham.  
*Woodborough (Notts).* — D: F-ino E. Richardson, «Manitoba», Nottingham Road.

**Finnujo.**

*Turku.* — D: Ilmari Ekström, L. Rantakatu 17.

**Francujo.**

*Rueil-Malmaison.* — D: L. A. Malmanche, 101, Avenue Paul Doumer.

**Hispanujo.**

*Alcira (Valencia).* — D: A. Carbonell Bosque, Str. Miguel Maura 26.

**Hungarujo.**

*Kalocsa (Pestmegye).* — D: Fr. Erdey, Tani-tókháza.



**Italujo.**

*Seriato (Bergamo).* — D: G. Gambirasio, Via Italia 40.

**Nederlando.**

*Almelo (Overijsel).* — D: F-ino G. H. Benink, Molenkamppark 8.

*Amersfoort (Utrecht).* — D: S-ino Koopmans Nauta, Leusderweg 215.

*Assen (Drente).* — D: J. de Jonge, Emmastraat 19.

*Baarn (Utrecht).* — D: Joh. Hartog, Dalweg 4.

*Bergen (N.H.).* — D: A. Pascha, Russenweg 4.

*Bergen op Zoom (N.B.).* — D: J. V. Holleman, Halsterscheweg 53.

*Coervorden (Drente).* — D: G. T. Knol, Van Heutszingsel 7.

*Den Burg (Texel).* — VD: J. M. Duinker, Parkstraat 7/10.

*Deventer (Overijsel).* — D: A. Bloemendal, Binnensingel 6.

*Eindhoven (N.B.).* — D: J. J. H. Teunissen, Mincklerstraat 7.

*2a Exloërmond (Drente).* — D: J. Hogenkamp, Hoofd der School.

*den Haag (Z.H.).* — D: J. Ravestein, Pomonalaan 55.

FD. (Kuracado) : S-ino P. H. v. d. Lek-Muns, Kwikstaartlaan 5.

*Hilversum (N.H.).* — D: S-ino E. J. Steinmeijer, Boomberglaan 15-a.

*Leeuwarden (Fr.).* — VD: G. Kuperus, 6e. Vegelinwardsstraat 1.

*Leiden (Z.H.).* — D: P. J. Hoop, Hooigracht 74.

*Oude Bildt Zyl. (Fr.).* — D: L. S. Swart.

*Rotterdam (Z.H.).* — D: P. Huisman, Esenburgsingel 97-a.

VD: J. P. Verheul, Gaffelstraat 48-a.

*Roermond (Limburg).* — D: S-ino C. Kater-Treiture, Godsweerderstraat 18.

*Schingen (Fr.).* — D: H. P. Breuker, Schingen 43, bij Dronrijp.

*Tholen (Zeeland).* — D: D. Hage, Czn.

*Utrecht.* — D: W. Baaten, Oudegracht 276 tz.

VD: E. A. Koot, Johan de Meesterstraat 12.

*Valkenswaard (N.B.).* — D: W. Fransen, Schoolstraat 25.

*Velsen (N.H.).* — D: P. van Heyst, Meer-vlietstraat 6.

*Vlissingen (Zeeland).* — D: J. Davidse, Grootte Markt 24.

*Vreeswijk (Utrecht).* — D: M. v. d. Kreeke, Zuiderstraat 9.

*Werkendam (N.B.).* — D: F-ino B. M. Bresler, Hoogstraat 65.

*Wildervanck (Gr.).* — D: P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam.

*Zwolle (Overijsel).* — D: J. de Lang, Assendorperdijk 38.

**Turkujo.**

*Istanbul.* — D: H. C. Günalp, Vicdirektoro de l' cementfabriko; Aslan, Darica apud Istanbul.

**Membro-Subtenantoj.**

Aliĝis kiel membro-subtenantoj:

14. L. Bouvier, Poix, Francujo.

15. S-ino J. T. Holmes, Torquay, Anglujo.

16. F-ino L. Deane, Broadstone, Anglujo.

17. M. Pearson, Sheffield, Anglujo.

18. P. Blaise, Morden, Anglujo.

19. T. L. C. Bluett, Worthing, Anglujo.

20. F-ino E. M. Bartholomew, Letchworth, Anglujo.

21. F-ino F. M. Bartholomew, Letchworth, Anglujo.

22. L. A. Churchill, Derby, Anglujo.

23. C. M. Hamaker, Hilversum, Nederlando.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.

## Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio

Sekretario: S-ro R. de Lajarte, 4 Villa d'Orléans,  
Fontenay-sous-Bois, Seine (Francujo).

### Oficialaj sciigoj N-ro 12 (Oktobro 1936)

1. Kun granda bedaŭro ni sciigas pri la morto de **D-ro Corret**, Akademiano, kaj de s-ro **Oskar Van Schoor**, L.K.-ano.

Eksiĝis el la Akademio: **Prof. Aymonier**, **D-ro Benneman**, **Prof. Migliorini**; kaj el la L. K.: **Ing. Orenge**, s-roj **Döhler** kaj **Christaller**.

2. La L.K.-anoj estas petitaj voĉdoni pri **ŝanĝo en la Regularo, koncerne la konsiston kaj elekton de la L.K.**

Respondis 53 membroj el 116.

52 aprobis la proponon, ke la nombro de la L.K.-anoj ne devos superi 100, kaj ke tiu nombro estu atingata antaŭ 1940, per neplenumado nur de la postenoj vakantaj pro morto aŭ eksiĝo. 45 aprobis la proponon, ke estu intertempo da unu jaruono inter la prezentado kaj la baloto de novaj membroj. Pri la propono forstreki el la Regularo la tekston rilatan al la lingva konsisto de la L.K., 18 aprobis, 31 ne aprobis, 4 ne decidis. Pro tiu rezultato tiu teksto ne estos forjetita.

La Jarlibro de 1936 estas redaktita laŭ tiuj decidoj, escepte la artikolon 9 de la Statutaro, kiu estos reĝustigata kiam la nombro 100 estos atingita.

Pro la decido pri deviga duonjara intertempo, la ĝisnunaj metodoj de elekto devas esti ŝanĝataj. La prezentado okazos la 1-an de julio kaj la baloto okazos komence de la sekvanta jaro.

Sekve, por la elektoj de 1937, la kandidatoj estas prezentitaj la 1-an de julio 1936.

3. Pro bedaŭrinda eraro en la programo, la **Kunsido de la Lingva Komitato** ne okazis dum la Kongreso en Vien. (Estis anoncita Kunsido de la Akademio anstataŭ Kunsido de la L. K.)

La Prezidanto: M. Rollet de l'Isle.

## Junulara Mondkongreso

### Brita Delegacio favoras Esperanton!

En kunveno de la Brita Delegacio por la Junulara Mondkongreso, ĵus okazinta en Ĝenevo, oni akceptis rezolucion por prezento al la Kongreso, petantan, ke la Kongreso rekomendu la akcelon de Esperanto inter la internacia junularo por superi la lingvajn barojn kaj helpi al la gejunuloj interkompreniĝi cele al mondopaco.

Pro la troŝarĝo de la tagordoj en la Kongreso mem oni ne povis prezenti la Rezolucion en Ĝenevo. Inter la rezultoj de la Kongreso estis la starigo de Daŭriga Komitato, kiu okupos sin pri la klopodoj disvastigi interkomprenon inter la junulaj organizoj. Laŭraporte la koncerna Rezolucio venos antaŭ ĉi tiu Komitato en la fino de Oktobro.

Ĉi tio estas la rezulto de multa klopodo flanke de la Britaj samideanoj, kaj espereble kuraĝigos la Esperantistojn tra la mondo. Nun estas tre urĝe, ke oni kontaktu kun la ĉefoj de la Junulaj Organizoj en siaj landoj, atentigante ke ĉi tiu Rezolucio estas konsiderota, kaj petante subtenon.

Gratulu amase al la Brita Delegacio! Ĉiu korespondajo estu sendata al British Youth Peace Assembly, Youth House, 250, Camden Rd., London, N.W. 1.

Pliaj detaloj sekvos en venonta numero — dume, tuja agado kaj subteno estas bezonega!

E. D. DURRANT,

Junula Sekcio, Londona Esperanto-Federacio.

### Esperanto en la gazetaron!



Nia fervora pola samideano, s-ro Henryk Gielb (maldekstre) dum interparolo kun s-ro A. Pisarski (dekstre), redaktoro de la oficiala pola gazetara oficejo PAT (Pola Agentejo Telegrafa) en Varsovio, kiu ofte disvastigas informojn pri Esperanto kaj la Esperanto-movado.



## U. E. A. kaj I. E. L.

### Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo

Pri la temo UEA-IEL ni publikigas ĉi-sekve ankoraŭ kelkajn voĉojn de diverslandaj samideanoj.

La jamaj aliĝoj de la plej gravaj landaj societoj al IEL (la brita, franca, nederlanda, sveda, dana, itala kaj aŭstra) pravas ke la granda plimulto de l' esperantistaro postfare aprobis la decidon de la estraro, eĉ se tiu decido ne estis konforma al la statutoj, kaj eĉ kvankam ĝenerale oni bedaŭris la translokigon de la sidejo el Genevo al Londono. La aliĝo de la plej gravaj landaj societoj al IEL, krome, pravas ke la granda plimulto de l' esperantistaro nun havas precipe unu grandan deziron: ke oni povu rekomenci energian agadon por nia afero, en interkonsento kaj paco. Ni jam ne priploru tion kio pasis, akceptu ĝin kiel jam ne eviteblan fakton, kaj prefere direktu okulojn kaj korojn en la estontecon.

### UEA — IEL.

Por eviti miskomprenojn rilate miajn lastajn kongresraportojn pri la fakkunsidoj de la instruistoj, mi deklaras, ke mi antaŭ jaroj estis kora amiko al s-ro Hans Jakob kaj ankaŭ tre ŝatis s-ron Stettler. Sed nun ne temas pri personoj, nun temas pri la «afero», pri la demando, kiamaniere la Esperanto-movado povas vivi kaj kreski. Mi vere ne komprenas la sinjorojn en Svislando, ke ili ne pensas pri tio ke, se ili daŭrigos la proceson dum multegaj monatoj, la Esperanto-movado dume devos ricevi mortbatojn.

Ni jam perdis jarojn! UEA tute ne bone funkcias; kaj krome la energi plena s-ro Kreuz dum longa tempo estis grave malsana kaj fine li mortis. Ĉu mortu same la Esperanto-movado, kiu devas morti, se la kapo ne povas labori?! La kuracisto ofte devas rapide fari gravan operacion. La operacio nun jam estas farita. Ni nun posedas ĝustatempe organizacion, kiu tre bone povas funkcii kaj multon fari, kio ĝis nun ne estis farata de la ĝismorte malsana UEA. Ni posedas nun energi plenan IEL-on kun freŝa sango. Se la amaso de la ĝisnunaj «kunlaborantoj» plu kunlaboros kaj aliĝos al IEL, ni atingos baldaŭ la celon, la grandan ekfloron de nia movado. Kial hezitu tiuj, kiuj bone povas ekkoni, ke nun temas pri **vivo aŭ morto**? La agadmaniero de la protestintoj mortigas ne nur UEA'n sed la tutan universalan Esperanto-movadon. Ĉar perdiĝis ja dum jaroj la tuta granda kapitalo de Hodler, mankas la necesa mono por Genevo, plu daŭros la proceso certe multajn monatojn, perdiĝos la nuna agadjaro ĝis somero 1937, perdiĝos same la fervoro de miloj da UEA-membroj, kiuj certe ne subtenos per kotizoj ruiniĝantan aferon, mankos plue la necesa mono, perdiĝos la pulsanta vivo.

Cu vi deziras tion?? Certe ne!

**Pro tio ekagu vi ĉiuj, kiuj ĝis nun laboris kaj emis labori!! Nova freŝa sango fluas tra la korpo.** Krome ankaŭ la gazeta afero de la centro estas nun fine sukcesplene solvita, ĉar ni posedas nun **unu gazeton de la centro: unu ĉiusemajnan gazeton Heroldo de Esperanto kun monata eldono Esperanto Internacia**; tio estas tre bona solvo de la tiom da jaroj daŭrinta gazeta demando! La ĝis-

nunaj kunlaborantaj membroj kaj delegitoj de la tutmonda Esperanto-movado agu en la kadro de IEL plu kaj plu! IEL estos ja tiamaniere nur nova nomo. Tiuj, kiuj efektive kaj energie emas labori, gvidas kaj gvidu nian tutmondan Esperanto-movadon! Ekagu, ekagu vi ĉiuj kune! Pripensu ĉiam, ke **temas nun pri vivo aŭ morto de nia movado!**

Rud. Mich. Frey, Wien,  
vicprezidanto de Aŭstria Esperanto-Asocio.

### Publika letero al svisaj delegitoj.

Karaj samideanoj kaj kolegoj!  
Vi honoris min per publika alvoko presita, mi do ankaŭ publike respondas al vi.

Unue mi dankas al vi, ke vi certe bonvole kaj konscie provis zorgi pri UEA kaj klarigi la situacion.

Sed samtempe mi ne povas konsenti kun via agado, ĉar unuflanke meritante dankon, ke vi — estante en la sidloko ĝisnun de UEA — rapidis informi nin pri la aferoj, kvankam parte laŭ via persona vidpunkto, aliflanke vi **sen komiso** de alilandaj UEA-membroj **procedis** kontraŭ la nuna estraro kaj **kaŭzis superfluaĵajn elspezojn**, ĉar nun vi povas vidi, ke la plimulto de la membroj kaj delegitoj akceptis la **solan** solvon por savi UEA: iri en alian landon.

Nin doloras la forlaso de Svisujo, sed ni ne kredas, ke UEA ne povus same prosperi en Anglujo — kie estas multaj internaciaj centroj, ankaŭ la **internacia skolta oficejo** \*) — aŭ ie ajn aliloke. Pro militdanĝero estus bona centro en Svisujo, sed I, kiu certigas, ke en estonta milito Svisujo ne partoprenos?; 2. eĉ se Svislando estos neŭtrala, ĉu la direktoro povos resti kaj ĉu venos kotizoj el la militantaj landoj por tie konservi UEA'n? Ĉar ne anoncis sin svisoj, kiu garantius eĉ en tiu okazo la gvidon de UEA-aferoj — kiel faris dum la mondmilito **Hodler**, ne pro pago de membroj sed el propra poŝo — la **svisoj ne havis moralan rajton reteni tie la UEA-oficejon**. BEA eble eĉ dum milito pli multon povus helpi ol la svisaj UEA-membroj.

Kvankam dolore, mi devas deklari, ke laŭ morala vidpunkto la svisaj procesantoj **devus pagi al UEA la elspezojn, kiujn ili kaŭzis**; tio estas la **verdikto de la esperantistaro**, kies mondorganizo ĝi ja estas, kaj kiu validas, eĉ se ne estas ia juĝejo, kiu diris ĝin. Espereble venontjare jam pliboniĝos la situacio de UEA en Londono — en la transloĝiĝa jaro tio ja ne estas esperebla, kaj ni ĉiuj povas amike kaj konkorde kunlabori por nia ĉefa organizo, kiu ja devas esti por ĉiu sincera esperantisto la **plej unua inter ĉiuj!**

Samideane,  
P. B a l k á n y i,  
ĉefdelegito por Hungarujo.

\*) Neniam mi aŭdis, ke dum Genevaj internaciaj konferencoj iu rimarkis la ekziston de UEA; por tio necesus, ke UEA ĉie aktive partoprenu. En Genevo mankis oficistoj por tiu celo, escepte kiam D-ro Privat mem agadis. Se en Londono estos iu, kiu partoprenos la internaciajn okazajojn, ankaŭ tie oni rimarkos, ke **Esperanto ekzistas**.

## Ilustritaj poŝtkartoj kun Esperanto-Teksto

### Eldoniĝaj de Aŭstria Ministerio por Komerco kaj Trafiko.

Federacia Ministerio por Komerco kaj Trafiko  
ĝeneraldirekcio

por la administrado de poŝtoj kaj telegrafoj  
No. 22672/1936

Aldonoj: 1. Wien, la 17. Junio 1936.

Al la preparanta Komitato por la  
28-a Universala Kongreso de Esperanto  
W i e n.

Ni havas la honoron, transsendi al Vi ĉi-interne represajon de dekreto, proksimtempe aperonta en «Post- und Telegraphen-Verordnungsblatt» (Gazeto de dekretoj poŝtaj kaj telegrafaj) por afabla scio; temas pri la eldono de la dezirataj bild-poŝtkartoj kun varboteksto, inter alie ankaŭ en Esperanto. La eldono de tiuj ĉi bild-poŝtkartoj okazos en la plej proksimaj tagoj.

Ĉe tiu okazo ni permesas al ni ankaŭ esprimi al Vi la plej nin-devigan dankon pro la afabla kunhelpo ĉe la havigo de la necesaj tradukoj de l'varboteksto en la francan kaj anglan lingvojn kiel ankaŭ en Esperanton.

La ĝeneraldirektoro: Steyskal m. p.

### 97. Novaj bild-poŝtkartoj po 35 groŝoj.

1. La bild-poŝtkartoj kun poŝtmarka surpreso po 35 g. destinitaj por la eksterlanda trafiko, estos okaze de la plej proksima nov-eldono provizataj per aldona varboteksto al la loknomoj, troviĝantaj sub la bildoj en la lingvoj germana, franca kaj angla kiel ankaŭ Esperanto. Samtempe kelkaj el la ĝis nun uzataj bildoj estas elŝanĝitaj kontraŭ novaj vidaĵoj. Cetere la ĝisnunna ekipa restas neŝanĝita.

2. La nova serio de bild-poŝtkartoj montras sekvantajn vidaĵojn:

#### El la federacia lando Burgenland:

Forchtenstein, Eisenstadt, Schllaining, Bad Tatzmannsdorf.

#### El la federacia lando Karintio:

Heiligenblut, Seebachtal apud Mallnitz, Kanzelhöhe, Pörtlach a. Worthersee, Millstatt a. Millstättersee, Velden a. Wörthersee.

#### El la federacia lando Malsupra Aŭstrio:

Baden a. Wien, Melk, Semmering, Ruino Aggstein, Puchberg a. Schneeberg, Oetscher.

#### El la federacia lando Supra Aŭstrio:

Traunkirchen, St. Florian, Gosausee—Dachstein, Steyr, Hinterstoder, Mondsee.

#### El la federacia lando Salzburg:

Hofgastein, Grossglockner - Hochalpenstrasse, Lofer, Zell a. See, Badgastein, Salzburg.

#### El la federacia lando Tirolo:

Kufstein, Innsbruck, Obergurgl en Oetzthal, Lermoos, Kitzbühel, Kals.

#### El la federacia lando Vorarlberg:

Feldkirch, Flexenstrasse, Bregenz, Silvretta-grupo.

#### El Wien:

Ringstrasse, Schönbrunn, Karlskirche, Ŝtata Operejo, Schwarzenbergplatz, Belvedere.

(B.M.Z. 22672 de la 17. Junio 1936.)

Granda eldonaĵo.

Somerservo 1936.

Oficiala Aŭstria Kursbuch (horaro).

85. jarkolekto.

Eldonita de Ministerio por Komerco kaj Trafiko, Ĝenerala Direkcio de la Poŝtoj kaj Telegrafoj ktp.

Jen la E.-traduko de la titolo de la libro, en kiu nun la unuan fojon aperis krom en la lingvoj germana, angla kaj franca ankaŭ Esperanto po 2 1/2 paĝoj sub la titoloj: «Legu antaŭ la uzado de l' libro!», «Ŝlosilo por la horarlibro», «Komparo de la tempo», kaj «Klarigo de la signoj».

Ni ĝojas, ke Aŭstria E.-Asocio sukcesis enkonduki ĉi tiun E.-tekston. AEA.

# Propagando de Esperanto

## Parolado de E. Malmgren en la Viena Kongreso

La historio de la Esperanto-movado rakontas al ni, ke en iu periodo la movado rapide kreskis en iu lando, kaj en alia periodo en alia lando. La kontakto inter la landoj koncerne la propagandmetodojn kaj la reciprokajn helpojn preskaŭ tute mankis. Ke nia movado suferis multe pro tio, estas memkompreneble.

Antaŭ kelkaj monatoj oni komisiis al mi krei internacian centron por la Esperanto-propagando. Sed tiu centro havu la celon fari konsilojn, pri ideojn kaj prezenti proponojn nur al la landaj asocioj kaj tute ne al izolaj esperantistoj aŭ lokaj Esperanto-grupoj. Estas ja la tasko de la tutlandaj asocioj direkti kaj gvidi la esperantistaron de la koncernaj landoj. Tiel la nova propaganda centro celas helpi nur la landajn asociojn, sed la tutmonda esperantistaro en siaj rilatoj kun la internacia Esperanto-movado ĉiam devas turni sin al la granda Centra Oficejo.

Kiam ni komencas starigi planojn por la propagando de Esperanto, ni devas antaŭ ĉio klarigi al ni la celon de nia propagando. Ĉu ni konsideru Esperanton kiel idealistan ideon aŭ kiel nuran lingvon? Ni povas ankaŭ fari la demandon tiel: Ĉu ni samtempe kiam ni instruas Esperanton al la homoj devas krei kaj devas postuli idealisman pensmanieron ĉe ili, aŭ ĉu nia celo estas instrui Esperanton al ĉiuj homoj en la mondo, al sanktuloj kaj pekuloj, al idealistoj kaj praktikistoj?

Se nin interesas nur la idealistoj, kiuj eble estas 1 % de la tuta homaro, tiam ni ankaŭ devas limigi niajn celojn. Tiam ni ja ne devas klopodi instrui ĉiujn homojn de la mondo pri Esperanto, sed ni devas serĉi la idealistojn kaj prediki la idealismon.

Sed ĉu oni do ne povus kunigi la du propagand-direktojn? Jes, pli malpli! Estas nome tiel, ke Esperanto en si mem prezentas al la homoj ion idealistan. Per Esperanto la homoj de la diversaj popoloj povas interparoli kaj diskuti por solvi siajn internaciajn demandojn. La vojo al la Paco estas pli ebena, post kiam la teknike mirinda rimedo Esperanto forigis la barojn. Ĉu tiu rolo de Esperanto ne estas sufiĉe grava? Jes, certe!

Kiam mi do nun kaj estonte skizos planojn por la propagando de Esperanto, mi ĉiam celas: *Esperanto por ĉiu!* Sed vi, miaj kunlaborantoj, povas havi tute alian opinion. Vi tamen povas havi bonan utilon de mia laboro, ĉar vi ja povos elekti tiujn proponojn, kiuj plaĉas

al vi. Cetere vi neniel estas ligita al miaj proponoj; vi povos ŝanĝi ilin, apliki ilin laŭ la cirkonstancoj de via lando kaj krom tio krei novajn proponojn kaj naski novajn ideojn. Kaj ĝuste tio estas tiel grava: ke vi ne kontentiĝos je la ideoj kaj proponoj prezentitaj de la propaganda centro, sed ke vi memstare laboru, kaj ke vi prezentu *viajn* proponojn al ni! Mi ripetas tion, ke nur pere de amika, bonvola kunlaboro kaj reciproka helpo ni povas atingi kontentigajn rezultojn.

Mi do petas pri kunlaboro, kunsento kaj kunagado!

### Kiel allogi la homojn lerni Esperanton?

Kiam ni rekomendas al la homoj lerni Esperanton, ni prefere samtempe tuj rekomendu iun Esperanto-kurson. Kaj se iu kurso laŭ sia aranĝo estas ne nur instrua sed ankaŭ amuza, tiam des pli bone. Pro tio ni ne povas tro alte taksi la valoron de la t. n. Cseh-kursoj kaj aliaj kursoj kun eksterlanda instruisto. Kelkaj personoj opinias, ke tiuj amuzaj kursoj allogas tro multe da homoj, kiuj nur volas amuziĝi, kaj kiujn oni poste ne povas konservi kiel organizitaj esperantistoj. Jes, parte tiu opinio estas prava, sed aliflanke ni devas sincere diri, ke la bonega kurso ne kulpas je tio, ke la daŭrigaj kursoj ne estas same interesaj kaj bonaj! La kulpo ne koncernas la Cseh-kurson sed koncernas nin, kiuj ankoraŭ ne kapablis eluzi la grandan entuziasmon en la Cseh-kursoj! Certe troviĝas miloj da bonegaj rimedoj, sed ni devas eltrovi ilin, inventi ilin!

La manieroj estas diversaj. Kaj ĉiuj manieroj estas bonaj, tamen ne la enuigaj! Tial mi ankaŭ respektas la manieron de pastro Cseh prepari interesan gazeton « La praktiko » por tiuj personoj, kiuj jam partoprenis elementan kurson. Persone mi plurfoje proponis al s-ro Cseh verki daŭrigan kurson same interesan kiel la komenca kurso. Ĉar eĉ se oni en la daŭriga kurso ne povas ĉion instrui, ĉiun detalon klarigi, la instruisto tamen dum pli longa tempo povas influ la pensmanieron de la kursanoj, kaj ili povos ĝui la personan kontakton kun la instruisto. En la komenco de la komenca kurso la interparolo, la reciproka komunikado inter la instruisto kaj la kursanoj estas ja sufiĉe limigita. Sed dum la daŭriga kurso la kursanoj povas dum la tuta tempo havi kontakton, personan ĝuon de la instruisto. — Jes, mi

faris tiun proponon, sed s-ro Cseh ja havis tiom da aliaj laboroj aŭ ne konsentis kun mia propono. Mi ankaŭ devas diri, ke mi tre bone komprenas la terure grandajn malfacilaĵojn, kiujn oni devas venki en tia kurso. Povas esti, ke oni eĉ devas fari du malsimilajn kursojn: unu por tiuj, kiuj jam scias aliajn lingvojn, kaj unu por tiuj, kiuj ne bone scias la gramatikon.

En ĉiu okazo ni nun troviĝas en tiu stato, ke ni devas prezenti al la homoj daŭrigajn kursojn, kiuj ne estas tiel amuzaj kiel la elementa kurso. En la daŭrigaj kursoj ni devas postuli pli da laboro de la kursanoj, jes, ili devas vere *labori*. Kiel ni do povas instigi ilin labori?

### Turistvojaĝoj.

En la mezo de Svedlando troviĝas la malgranda urbo Karlskoga. Tie oni aranĝis elementajn kursojn dum la pasinta aŭtuno. Sed ne estis ordinara kursoj! La kursaranĝantoj nome antaŭ la kurso kontaktiĝis kun la sveda Esperanta Turista Komisiono por havi informojn pri turistvojaĝo al Estonio. Kaj oni do anoncis la Esperanto-kursojn en tiu maniero, ke oni promesis, ke tiuj personoj, kiuj partoprenis la Esperanto-kursojn povos partopreni la turistekskurson Karlskoga - Stokholmo - Tallinn kaj reen. La kosto por vojaĝoj, loĝo kaj manĝo estos entute 70 kr. (28 holandaj guldenoj). En la lokaj gazetoj oni kompreneble samtempe skribis kelkajn belajn artikolojn pri Estonio kaj pri Tallinn. — Montriĝis, ke la sukceso estas plena. Kaj ne nur por la elementa kurso, ĉar la plej multaj partoprenis ĝis la fino ankaŭ la daŭrigan kurson! Kial, jes ĉar ili nature volis perfektigi por povi paroli en la fremda lando! Kaj somermeze 1936 okazis tiu turistekskurso. Partoprenis pli ol 50 personoj, kiuj je la reveno al sia hejmloko estis tiel kontentaj, tiel entuziasmaj, ke ili unuvoĉe deklaris, ke ili ĉiuj intencas daŭre aparteni al la Esperanto-klubo kaj ankaŭ varbi novajn esperantistojn. Kaj ke ili ankaŭ en la venonta jaro volas fari Esperanto-ekskurson al la eksterlando. La sukceso de la aranĝo estis do plenplena!

Mi havas la imagon, ke oni en pluraj landoj povas fari similajn aranĝojn. Grave estas nur komenci la antaŭparon en frua tempo. Do unue kontaktiĝu kun esperantistoj en najbaraj landoj kaj havigu informojn pri kosto de loĝo kaj manĝo en tiu aŭ alia interesa urbo. Ankaŭ informiĝu pri la rabatitaj bilet-

prezoj por grupo de 20 aŭ 50 personoj. Kaj laŭ la ricevitaj informoj vi pretigu la propagandon. Sed nun mi volas fari averton! Kalkulu je tio, ke via Esperanto-klubo aŭ Turista komisiono gajnos kelkajn kronojn okaze de la aranĝo, ĉar oni ja tamen devas havi diversajn elspezojn ĝeneralajn. Aliflanke mi avertas je tio, ke la turistarango de la esperantistoj devas esti pli favora ol tiu de iu ajn alia turistentrepreno! Ni esperantistoj nepre devas montri al la publiko, ke ili gajnas, se ili aliĝas al ni! Tio estas plej esence grava, ĉar nia celo ja estas servi la homojn kaj ne monpumpi ilin. Sed kiam la turismaj aranĝoj pligrandiĝas, tiam oni ankaŭ povas mone rekompenci la laborantojn. En la komenco tio tamen ordinare ne estas ebla.

### Preleg-vojaĝoj.

En kelkaj landoj oni organizis sisteme prelegvojaĝojn por eksterlandaj prelegistoj. Tiamaniere la granda publiko ja ricevas senperan kontakton kun la eksterlando kaj kun la utilo de Esperanto. En Svedlando, kie oni plej serioze utiligis tiun ideon, oni havas la plej kontentigaĵn spertojn pri la aranĝo. Tie oni dum kelkaj jaroj faris kontrakton kun eksterlandano por tuta jaro. Ekz. S-ro Sinha siatempe faris ĉ. 200 prelegojn en la tuta lando, kaj same s-ro Mustapha Raden. Por la sezono aŭtuno 1936 la svedoj dungis eĉ du prelegistojn, s-ron Scherer

kaj la islandan verkiston Thorbergur Thordarson.

Kelkfoje oni ankaŭ povas dungi teatro-grupon por la sama celo. Antaŭ proks. unu jaro sveda teatro-grupo vizitis la Baltajn landojn kaj ludis en Esperanto. La rezulto estis morale kaj publike bona, sed ekonomie ne kontentiga. Tamen mi havas la senton, ke oni povas ankaŭ solvi tiun problemon.

Cetere mi opinias, ke ni ne devas esti ligitaj al la jam pruvitaj manieroj rilate al prezentado antaŭ la granda publiko. Ni serĉu novajn kampojn, por ke la publiko havu la senton pri Esperanto, ke ĝi estas ne nur praktika sed laŭmoda!

### Gazetara servo.

Pluraj landoj atentigis min pri la graveco de la pergazeta propagando. Kompreneble ili pravas. Kaj nun mi prezentas al vi plej simplan kaj samtempe plej racian solvon: Nia oficiala organo Heroldo de Esperanto (Esperanto Triumfonta) devas en ĉiu semajno havi anglon aŭ kolonon kun la rubriko ekz. « Esperantokolono de la gazetaro ». Tiu kolono enhavu resumajn artikolojn pri ĉiuj Esperanto-novaĵoj. Ĉiu artikolo enhavu ne pli ol maksimume 10 liniojn. Prefere eĉ pli mallongaj sciigoj. Kaj la teksto devas esti simpla kaj verkita tiel, ke oni povas facile senpere traduki en la nacian lingvon. Kaj la gazeto devas konstante peti la abonantojn traduki la

novaĵojn por siaj lokaj naciaj gazetoj. Plej saĝe estas, ke la tutlandaj asocioj organizas tiun gazetaran servon tiel, ke en ĉiu loko iu persono respondecas pri la informado al la gazetaro.


Ni ankaŭ devas memori, ke nia oficiala organo ne povas enpresii novaĵojn, se oni ne sendas informojn al ĝi. Pro tio mi rekomendas al vi konstante stari en kontakto kun la gazeto.

En kunligo kun tiu pergazeta informado mi ne povas silenti pri treege interesa aranĝo en Svedlando. Temas pri Sved-Internacia Gazetservo, la oficiala sveda oficejo, kiu distribuas novaĵojn pri Svedlando. Antaŭ kelka tempo skribis la ĉefo de tiu oficejo, d-ro B. Brilioth: « La tasko de mia oficejo estas disvastigi konon pri kaj simpatio por mia lando pere de la gazetaro en la tuta mondo. Por plifortigi la laboron mi turnis min al la esperantistoj de Svedlando kaj de aliaj landoj por ricevi helpon distribui la novaĵojn. La rezulto nun estas, ke dank' al sindona, senpaga laboro de multaj esperantistoj la Esperanta eldono de niaj novaĵoj estas dissendata al 30 landoj kaj estas enpresata en la koncernaj gazetoj. Ĉirkaŭ 70 esperantistoj en la tuta mondo nome ricevas la materialon kaj tradukas la artikolojn al la propra lingvo por posta enpresado en la naciaj gazetoj. Ĉu oni tiam povas dubi pri la sindone helpema kaj ideala entuziasmo, kiu vivigas la esperantistojn? Kun dankemo kaj admiro mi esprimas mian konvinkon, ke Esperanto estas unu el la plej promesigaj kaj efektivaj rimedoj por disvastigi la lumon de la internacia kunsento en malluma, disrompita mondo. »

Laŭ tiu ĉi eldiro vi komprenas, ke la ĉefo de la sveda Internacia Gazetservo estas tre kontenta pri la Esperanto-eldono. Pro tio mi rekomendas ankaŭ al vi en aliaj landoj imiti la aranĝon. Tie kie ekzistas oficiala reklam-oficejo aŭ novaj-centro por la distribuo de enlandaj artikoloj, eluzu la eblecojn! Grave nature estas, ke iu lerta esperantisto en via lando promesas konstantan helpon por traduki la artikolojn Esperanten. En Svedlando oferis sin s-ro verkisto Stellan Engholm, kiu ĉiusemajne faras la tradukojn. Jam dum pli ol du jaroj li senĉese malegoisme, senrekompence laboris en tiu kampo. Honoron al li!

### Koresponda kurso.

Alia rimedo, per kiu oni povas konstante ataki la grandan publikon, estas pere de koresponda kurso. Tia koresponda kurso devas esti amuza kaj facila. Kaj antaŭ ĉio ĝi devas esti malmultekosta! Pro tio estis ĝis nun nur la sveda koresponda kurso, kiu fariĝis populara. La sveda kurso kostis nome nur 1 kr. (= 0,40 holandaj guldenoj). Ĉiujare pli ol 4.000 personoj mendis tiun kurson! Oni do ne povas tro taksii la propagand-



#### Estraro de Selebesa Esperanto-Asocio.

En Makassar (Nederlanda Orienta Hindujo), dank' al la iniciato de s-ano Servius Mamesah, estas fondita Selebesa Esperanto-Asocio, kies estraron montras nia klišo: I. Abdul Malik, prezidanto; II. Sahibu, sekretario; III. Tarachand, kasisto; IV. E. M. Anang; kaj V. Rafiuddin, estraranoj. — S-ro Tarachand estas brithindujano, kiu tre aktive kunlaboras kun la indonezi-anoj por la disvastigo kaj propagando de Esperanto inter sianacianoj en Makassar. Generale, Selebesa Esperanto-Asocio akceptas kiel membrojn anojn de ĉiuj rasoj, naciecoj aŭ religioj. SEA aliĝas al la universala organizo esperantista. En kelkaj indoneziaj ĵurnaloj jam aperis la statuto de SEA, en malaja lingvo, kaj artikoloj pri la asocio kaj pri Esperanto. Ni deziras al la nova Asocio bonan prosperon kaj longan vivon.



# Pri la fakkunsidoj de la geinstruistoj

dum la 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Wien Aŭgusto 1936.

## Grava raporto por ĉiuj, ankaŭ por ne-instruistoj

Tiujn fakkunsidojn de la geinstruistoj kaj geprofesoroj preparis kaj gvidis s-ro lernejs-inspektoro registara konsilisto Fr. STENGEL kaj mi. Alvenis valorplenaĵoj leteroj el diversaj landoj, kiuj kune kun la referatoj, kiujn ni aŭdis, donis al ni klaran bildon pri la Esperanto-movado en vico da landoj. Per tio fariĝis la fakkunsidoj de la geinstruistoj tre gravaj. Bedaŭre el multaj landoj de la mondo mankas ankoraŭ tia klara bildo, sed iom post iom la geinstruistaro *Esperantista* certe ekkonos la signifon de diligenta kunlaboro. Tiu kunlaboro en ĉiuj landoj estas nepre tre necesa. Ni vidis en Wien, ke dum la ĝisnunaj 49 jaroj la Esperanto-movado efektive venkis, tio signifas, ke alia projekto de artefarita lingvo, kiu povus atingi la venkon, ne ekzistas kaj ne ekzistos, ĉar la lingvo de nia *Majstro* jam posedas tian disvastigecon en la tuta mondo, ke devus veni funt-miliardulo, kiu per miliardoj devus fortrudi Esperanton por alia sistemo. La homoj certe ne havas zorgojn, ĉu la vortoj finiĝas tiel aŭ tiel, sed ili deziras praktikan kaj sufiĉe belsonan kaj facile ellerneblan lingvon. Kaj tiujn avantaĝojn posedas Esperanto en vere alta rango. Nur temas nun, ĉu ni venku baldaŭ aŭ ne-baldaŭ! Sed ni *volas* kaj *devas* baldaŭ venki. Ĉi kune ni publikigas la rezoluciojn, faritajn dum la kongreso. Sed plue ne temas, ke ni verkis la rezoluciojn, ke ni skribis ilin sur paperon; la ĉefzorgo de ni en Wien nun estas, ke ni realigu ilin kiel eble baldaŭ. Kaj baldaŭ ni vizitos nian altrangan Esperanto-favoranton, la ministron por komerco kaj trafiko *Frits Stockinger*, kaj ni estas certaj, ke ĝis la de la UEA-prezidanto generalo *Bastien* al ni anoncita konferenco en Parizo je pentekosto 1937 ankaŭ ni estos farintaj bonajn paŝojn por la konferenco je pentekosto

dan valoron de tia kurso. Por tiu ĉi nova laborsezono la eldonistoj de la kurso, Eldona Societo Esperanto en Stockholm, cetere novredaktis la kurson por fari ĝin ankoraŭ pli alloga al la granda publiko. La nomita societo intencas sendi proponon al aliaj landoj eldoni la kurson ankaŭ por aliaj lingvoj.

Mi volas atentigi pri tio, ke la malalta prezo de la kurso ne forigas ĉiujn eblecojn mongajni pere de la kurso. La svedaj eldonistoj ekz. gajnis ĉiujare inter 100 ĝis 500 kronoj!

(*Daŭrigota.*)

1938 en *Wien*. El la leteroj kaj referatoj dum la 28-a kongreso ni bone ekkonis, ke nia celo nepre devas nur esti la *deviga* enkondukado de Esperanto en la lernejojn. Krom aliaj treege pledas por la *deviga* enkondukado la detala letero de mia bulgara amiko kolonelo *Silvestriev* (prez. de « E-societo Vekiĝo »), grava pioniro en Bulgario, kies leteron ni kune kun la aliaj altvaloraj sciigoj el diversaj landoj publikigos post iom da tempo en « Internacia Pedagogia Revuo », Oficiala Organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj E-istaj (TAGE), (laŭ decido dum la fakkunsidoj), same ankaŭ tiujn referatojn, kiujn la referintoj sendos al ni, ekzemple la referaton de la Honora Sekretariino de « Eduka Komitato de Brita Esperantista Asocio » *Violet C. Nixon*, kiu tiel elokvente kaj konvinkige paroladis pri la efektiva bonaj sukcesoj, ke ni publikigas tiun referaton ankaŭ ĉi tie en « Esperanto Internacia ».

Rudolf Michael FREY, Wien.  
III., *Bechardgasse 14.*

### Lastatempa laboro de « Brita Esperanto-Asocio » en edukaj rondoj.

Raporto de *Violet C. Nixon*, h. sekr. de « Eduka Komitato de BEA ».

En la jaro 1930 stariĝis speciala komitato de B.E.A. kun la celo, diskonigi Esperanton en edukaj rondoj kaj plifaciligi la enkondukadon de E. en la lernejojn. La komitato ordinaro kunvenas trifoje en la jaro.

La unua paŝo de la Komitato estis, praktike utiligi la prestiĝon de multaj bonkonataj edukistoj, subtenantoj de Esperanto. Dudektri personoj permesis la presigon de siaj nomoj sur specialan leterpaperon en flankkolono, sub la titolo « Honoraj Konsilantoj ». Tiu ĉi papero havigas por ni atenton kaj respekton.

Dua paŝo estis la pretigo de « memorandum » anglalingva pri la « Eduka Valoro de Esperanto », kiu konstatas koncize la avantaĝojn de Esperanto kaj postulas, ke ĝi estu la *unua lingvo* instruota en la lernejoj post la nacia (gepatra) lingvo. Tiun ĉi alvokon sub-

skribis 22 eminentuloj en edukaj rondoj. Miloĵ da ekzempleroj jam estas dissenditaj aŭ venditaj kaj nova aldono nun estas preparata.

La Komitato zorgas por la aranĝo de kunvenoj kaj ekspozicioj pri la eduka flanko de Esperanto en BEA-kongresoj. Antaŭ du jaroj ĝi aranĝis specialan kunvenon en University College, London, por Esperantistaj instruistoj, kie oni pritraktis aktualajn problemojn pri Esperanto en lernejoj. Tiun ĉi kunvenon partoprenis reprezentantoj de preskaŭ ĉiu tipo de lernejo.

Alia flanko de BEA-laboro estas la agado de s-ro Montagu BUTLER kiel sekretario por Edukado. Li kutime uzas la leterpaperon de la Eduka Komitato, kiu bone funkcias kiel prezentletero, kaj proponas prelegon kaj provlecionon. Per la BEA-*aŭtomobilo* la lernejoj estas atingeblaj, kiam sufiĉaj akceptoj ebligas rondvojaĝon. Unu sukceso kondukas al alia. De la komenco de 1<sup>a</sup> jaro 1935 ĝis majo 1936 s-ro Butler vizitis 175 lernejojn diverstipajn kaj demonstraciis antaŭ 25.331 gelernantoj kun 803 geinstruistoj. Post la vizitoj BEA ofte ricevas leterojn kun tre favoraj raportoj pri la vekita intereso. Rezultato: du folietoj estas presitaj, la unua kun listo de la lernejoj kaj kolegioj jam vizititaj, la dua kun elĉerpajoj el leteroj, montrantaj la sukceson de la vizito. Tiuj ĉi folietoj estas helpiloj, skribante al novaj lernejoj.

Unu el la argumentoj kontraŭ Esperanto, kiun oni ofte aŭdas en altgradaj lernejoj, estas, ke ĝi ne estas oficiale ekzamenata temo, do pro tio ne povas esti deviga en la temaro. En Anglujo estas necese, ke tia postulo venu de la lernejoj mem. Por instigi la lernejestrojn, pripensi la prezentadon de Esperanto kiel temo en la abiturienta diplomo, la Eduka Komitato — kun la helpo de multaj instruistoj kaj fakuloj — pretigis kvarjaran kurson por altgradaj lernejoj, kun specimena demando je la diploma nivelo. Tiun ĉi la Komitato dissendas al tiuj lernejoj, kie la sento al Esperanto jam estas favora.

Por montri la efikon de Esp. en lernejoj kiel informilo, la sekretario de la Komitato petis eseojn en la nacia lingvo pri « Mia Esperantista Korespondanto ». Kvankam nur kvar lernejoj respondis, la analizo de la eseoj donis materialon por sufiĉe interesa kaj konvinkiga raporto. Rezultate el tiu ĉi raporto, la sekretario

ricevis inviton, alparoli la Komisionon de la Nova Edukada Asocio, kiu kun-sidis en Cheltenham, Anglujo, en Aŭg. 1936, por esplori la problemon de edukado por internacia interkompreno.

Por la lernejoj mem la BEA starigis planon, per kiu iu lernejo povas prezenti kandidatojn por simpla skriba kaj parola provo. S-ro Butler vizitas, por ekzameni, kaj la plej bonaj kandidatoj ricevas malgrandajn premiojn. Ĝis nun du lernejoj jam provis la ekzamenon

Aliaj farotaĵoj, nun pripensitaj, estas la aranĝo de kurso por geinstruistoj en Liverpool Universitato, kun la helpo de profesoro Collinson, kaj dua kunveno por geinstruistoj en London.

Oni povas esperi, ke post tiom da persista, tamen malrapida agado, la intereso pri Esperanto pligrandiĝos en la lernejoj; kaj el tio devenos kelkaj gravaj problemoj:

1-e) la provizo de bone ekipitaj instruistoj;

2-e) la neceso de interesaj legolibroj kaj lernolibroj por junaj gelemantoj (ne nur por infanoj);

3-e) la ebligo, uzi la lingvon en bone gvidataj centroj, kie la lernantaro povas trovi kamaradojn el diversaj landoj kaj konvinkiĝi pri la viveco de la lingvo.

Ni en Aŭstrio kaj certe niaj E-ementuloj en ĉiuj landoj havas grandan ĝojon, ke nia tre ŝatata kolegino en Birmingham raportas tiom pri efektivaj sukcesoj. Ni krome havas ĝojon pro tio, ĉar en ŝia lando nun estas la centro de IEL, kaj ni estas certaj, ke IEL sub tiaj favoraj cirkonstancoj kaj kun **helpo de la tieaj tre seriozaj samideanoj tre efikplene kreskos kaj ekfloros je granda impona organizaĵo, estimata kaj altsata en ĉiuj landoj de la mondo!! Forta Internacia Esperanto-Ligo** ege helpos al ni, atingi baldaŭ la venkon de Esperanto en **ĉiuj landoj!** Ni en Wien konstruados pluen kaj petas la samideanojn ĉiuloke, ke ni ĉiuj agu kune kaj subtenu per vigla propagando IEL-on kaj nian por nia mondmovado tre necesan **ĉiusemajnan gazeton Heroldo de Esperanto!**

Fine mi nur volas aldoni, ke ni en Aŭstrio feliĉe jam posedas **lernolibrojn**, kiuj estas de la **instruministerio aprobitaj** (unu de lernejspektoro registara konsilisto Fritz Stengel kaj du de profesoro d-ro Casari kaj de ĉeflernej-instruisto Franz Schreiberreiter), krome aliaj tre oportunaj. Ni posedas ankaŭ **ŝtatan ekzamen-komisionon** (tio estas de la **ministerio**), la solan tian en la mondo, sub la gvidado de la provinc-lernej-inspektoro kortega konsilisto d-ro Franz Wollmann, kiu fariĝis el Saŭluso fervora Paŭluso.

R. M. FREY.

## LA REZOLUCIOJ

**kiuj UNUANIME kaj kun GRANDA APLAŬDO estis akceptitaj, unue dum la fakkunsido de la geinstruistoj kaj fine dum la lasta Laborkunsido de la 28-a Universala Kongreso de Esperanto la 15-an de Aŭgusto 1936 en Wien.**

### 1-a rezolucio:

La Esperantistoj, kunvenintaj el 35 landoj al la 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Wien, precipe la tre multaj geinstruistoj kaj geprofesoroj, dankas al sinjoro Aŭstria federacia ministro por komerco kaj trafiko *Fritz Stockinger* pro lia ĝisnuna granda intereso por Esperanto kaj pro lia altvalora helpo kaj petas la sinjoron ministron, ke li bonvolu ankaŭ estonte pluen tre helpi al niaj penadoj kaj klopodoj kaj precipe, ke li afable subtenu tre energie nian rezolucion ĉe la Aŭstria registaro, por ke la **ministerio por komerco kaj trafiko** laŭeble kune kun la instru-ministerio aranĝu por pentekosto 1938 en **Wien oficialan Internacian Konferencon**, detale nomitan en la rezolucioj al la Aŭstria registaro kaj al la registaroj de ĉiuj civilizitaj landoj de la mondo. Niaj Esperantistaj organizaĵoj en ĉiuj landoj klopodos kun ĉiuj fortoj, por ke la laboro de la Aŭstria registaro estu plenplene bone kronata per granda sukceso.

### 2-a rezolucio.

Konsiderante la fakton, ke gravaj fakementuloj en plej diversaj landoj de la mondo *konstatis*,

1. ke pro la ĉiam pli kaj pli grandaj interkomunikig-eblecoj la diverslingvaj popoloj nepre bezonas komunan interkompeniĝ-lingvon;

2. ke tiu lingvo devas esti plej eble facile ellernebla kaj pro la nacia envio eĉ neŭtrala;

3. ke Esperanto estas tia lingvo, dum preskaŭ 50 jaroj elpruvita; kaj

4. ke Esperanto jam posedas grandan disvastigecon — rekonitan de multaj ministerioj, komercaj ĉambroj ktp.;

pro tio la geinstruistoj kaj geprofesoroj de fundamentaj, de mez- kaj alt-lernejoj, kunvenintaj en Wien al la 28-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj la tuta kongreso solene *konstatis*;

ke estas nepre necese, ke Esperanto estu enkondukata en ĉiuj civilizitaj landoj — en ĉiuj lokoj kun fremdul-frekvento — kiel *deviga* fako en la lasta klaso, respektive en la lastaj klasoj de ĉiuj fundamentaj lernejoj de dekjaraj geknaboj, sed **certe antaŭ** la eklernado de iu ajn fremda lingvo, ankaŭ de la latina, — pro la elpruvita

tre oportuna preparo por la eklerno de fremdaj lingvoj —;

kaj *turnas* sin al la *registaroj*, al la komercaj ĉambroj, al la radio-stacioj kaj al la instancoj por fremdul-frekvento en ĉiuj civilizitaj landoj de la tuta mondo kun la *peto*, pripensi la ĉi supran konstaton kaj *sendi* oficialajn delegitojn al tiu **Internacia Konferenco**, rilatanta la enkondukadon de Esperanto kiel deviga fako en la lernejon, en komercon kaj trafikon, kiun kunvoki al **Wien** por **pentekosto 1938**, ni petas la **Aŭstrian registaron**; tiuj oficialaj delegitoj estu sendataj el la ministerioj por instruo, por komerco kaj trafiko, rilate la instruon de Esperanto en la fundamentaj, en la mez- kaj alt-lernejoj; kaj ni petas la registarojn, nepre *igi*, ke delegitoj estu sendataj ankaŭ flanke de la komercaj ĉambroj, de komercaj lernejoj, de ĉiuj radio-stacioj kaj de ĉiuj instancoj por fremdul-frekvento ktp., por ke oni povu fari valorplenajn decidojn rilate la en ĉiuj landoj komunan, oficialan kaj devigan enkondukadon de Esperanto en la lernejon kaj praktikon (komerco, trafiko ktp.).

### 3-a rezolucio.

Konsiderante... (kiel en la 2-a rezolucio) ..... por la eklerno de fremdaj lingvoj —,

kaj *turnas* sin al la *Aŭstria registaro* kun la *peto*, ke ĝi — konsiderante la tre oportunan sukceson de la Internacia Konferenco « Esperanto en la lernejon kaj praktikon », okazinta je pentekosto 1934 en Wien kaj malfermita eĉ per la ministro por komerco kaj trafiko *Fritz Stockinger*, kaj konsiderante la nunan 28-an Universalan Kongreson de Esperanto en Wien — nun **preparu mem** novan oficialan pli grandan kaj pli gravan **Internacian Konferencon** en **Wien** rilate la enkondukadon de Esperanto kiel **deviga** fako en la fundamentajn, mezajn kaj alt-lernejojn de ĉiuj civilizitaj landoj kaj ke la **Aŭstria registaro** bonvolu mem oficiale **kunvoki** al Wien por **pentekosto 1938** al tiu Konferenco la oficialajn delegitojn de ministerioj por instruo, por komerco kaj trafiko, de komercaj ĉambroj, de komercaj lernejoj, de radio-stacioj kaj de la instancoj por fremdul-frekvento ktp. el ĉiuj civilizitaj landoj de la tuta mondo, por ke dum tiu Konferenco estu farataj valorplenaj decidoj rilate la en ĉiuj landoj komunan, oficialan kaj devigan enkondukadon de Esperanto en la lernejon kaj praktikon (komerco, trafiko ktp.).

### 4-a rezolucio.

Konsiderante... (kiel en 2-a rezolucio) ..... por la eklerno de fremdaj lingvoj —,

# Ni kaj la Skolta Ĵamboreo de 1937

Ŝanco, kiu fariĝu fakto !

Estas en Esperantistaj rondoj sufiĉe konate, ke la skolta ĵamboreo okazos la sekvantan jaron — do en 1937 — en unu el la plej ĉarmaj partoj de Nederlando, nome, sur la konataj terenoj de l' vilao « Vogelenzang ».

La preparoj, kiujn la gvidantoj de l' skolta movado en Nederlando ĝis nun jam faris, promesas en ĉiuj direktoj plenan sukceson.

En nia oficiala semajngazeto diversaj personoj jam plurfoje atentigis pri la graveco, kiu povos — se nur la bona maniero estas sekvata ! — kreski el la tie ĉi priparolata ĵamboreo.

Ni volas tie ĉi esprimi kiel nian opinion, ke la sukceso — aŭ fiasko — rilate la uzadon de Esperanto dum la ĵamboreo 1937, kuŝas precipe en la manoj de ni, Esperantistoj, mem.

Se ni nur aplikas la ĝustan taktikon — kaj kial ne? — tiam por nia movado certe sukceso estas atingebla; eĉ granda sukceso. Sed tiam ni nepre atentu jenajn punktojn:

a) en lokoj, kie troviĝas skoltaj trupoj, pri kiuj oni scias, ke ili — aŭ kelkaj membroj-skoltoj — vizitos la venantan ĵamboreon, la gvidantoj de l' loka Esperanto-klubo serĉu kontakton kun la skolestro(j), por atentigi(i)lin pri la praktika utilo de Esperanto dum la ĵamboreoj; ĉe tio oni fingremontru al la multflanka uzado, kiun la skoltoj aplikis dum la ĵamboreo de l' pasinta jaro (1935) en Gödöllö, kiu nekontesteble pruvis, ke Esperanto envere povas servi diversflanke al la skolta movado.

Jen, en rapida resumo, kelkaj faktoj pri Gödöllö :

La hungara skolttrupo 329, sub gvido de skolestro Andreo Tzikszy, kiel ankaŭ la trupo 199, sub gvido de Josefo Szecsei, parolis dum la tuta ĵamboreo ekskluzive en Esperanto; trupestro Emérico Papp konstruis kun la helpo de l' skoltoj Garms, Tekete, Schuster, Kurucz kaj aliaj sur la skolta ekspozicio kun multa sukceso la t.n. Esperantomuron; **oficiale** skolttrupo de Esperanto-parolantaj gvidantoj oficis kun granda efiko por eksterlandaj skoltoj; Esperantistoj deĵoris ĉe la banko, bilet-

vendejoj, ĵurnaleldonejo, poŝto, radio ktp.; pli ol dudek (20) Esperantistoj-skoltoj partoprenis en la t.n. « tendarpolico ».

b) Oni akiru de la tiurilata skolestro la permeson por propagandoparolado antaŭ la skoltoj.

c) La natura kaj logika konsekvenco de l' propagando-parolado devas esti, ke Esperanto-kurso povu esti komencata

d) La kurso pretigu la skoltojn por la lingvo-kapabla atesto de l' skoltmovado, kiu rajtigas la portadon de aparta signo.

Ni firme kredas, ke ni, sekvante suprajn instigojn, konstruos firman bazon, sur kiu la domo de l' definitiva sukceso, atingebla kaj atingenda, rilate la skoltan ĵamboreon de 1937, povas esti konstruata.

Sed tamen **aparte** ni volas premi sur la koron de niaj kursgvidantoj, ke ili instruu nian internacian lingvon al la skoltoj **tiel**, ke tiuj ne nur teorie, sed unualoke kaj perfakte estu kapablaj, paroli nian lingvon **flue** kaj **senskue** !

La tempo ankoraŭ permesas profundan instruadon de Esperanto; la kursgvidantoj estu konsciaj pri la graveco de sia tasko, de kies deca plenumado dependas ĉefe la sukceso de la Esperantogvidado en skoltaj rondoj.

Ni — Esperantistoj — memoru, ke miloj kaj miloj da skoltoj, venante el la tuta mondo, dum la ĵamboreo 1937 sur « Vogelenzang » en Nederlando, formos por kelkaj tagoj kvazaŭ apartan komunumon; komunumon de junaj, spiritfortaj knaboj, en kies koroj ankoraŭ flamas idealismo kaj kies vivkuraĝo estas ankoraŭ netuŝita kaj blanka kiel lilio; ili estas la juna, eksplodanta vivo, kiu portas en si la ĝermojn de ĝojiga kaj esperplena estonto; ili preparas sin, por ke tiu ĉi estonto trovu ilin pretaj laŭ spirito kaj korpo.

Tiu ĉi idealista sfero devas esti por ni — flanke de l' ĉefideo: propagando por Esperanto! — unu el la instigoj, por planti por ĉiam la Esperanto-standardon en la rangojn de l' skolta movado.

Ni nun havas la ŝancon ! La ŝanco fariĝu do fakto !

Nico Hoen jr

Brita Parlamentano por Esperanto.

## Sukcesa Ekspozicio kaj Bazaro en Londono.

La 19-an de septembro la Londona Esperantista Federacio okazigis sukcesan Ekspozicion kaj Bazaron en la Bethnal Green Men's Institute. La motivo estas helpi al la monokolekto kiun la brita Esperantistaro faras por aĉeti propran « Esperanto Domon » en la centro de Londono.

Nia bone konata Ĉe-instruistino, F-ino Saxl, per koraj vortoj malfermis la kunvenon, kun la apogo de Sir Percy Harris, liberala parlamentano.

Dufoje Sir Percy parolis, kaj en la vespero li diris interalie, ke kvankam estas homoj kiuj primokas Esperanton, se nur estus centoj da milionoj anstataŭ la nunaj 1-3 milionoj da Esperantistoj, kia malsama kaj plibona loko la mondo estus kompare kun la nuntempa. Se oni elspezus nur 1 procenton de la kosto de Eŭropa armado por instrui la internacian lingvon, oni estus multe pli proksima al la unueco de la homaro. Estus pli da sekureco, kaj la homaro marŝus sur pli feliĉa vojo ol la tiel nomita « armado por la defendo ». La idealo de la Esperantistoj estas la ĝusta vojo pli intime kunligi la naciojn, kaj se tiu idealo realiĝos ĝi estos mirinda potenco por la bono.

S-ro Reginald Stamp, deputito en la Londona Urbkonsilantaro estas mem Esperantisto kaj li kuraĝige parolis, instigante al vigla kaj entuziasma kunlaboro por nia afero.

Alia Deputito en la Londona Urbkonsilantaro, S-ro Tom Dawson prezidis la kunvenon.

Inter aliaj parolis Prof. Fawcett, D. Litt. — en Esperanto, S-ro Tingey, de la Londona Taksista Grupo amuze kaj sprite priskribis spertojn de la membroj de tiu grupo. Ankaŭ parolis s-ro Wagstaff, la Administranto de la Instituto.

Estis montrata impona kolekto de Ekspozicia materialo, konsistanta el turismaj folioj, afiŝoj kaj ankaŭ materialo koncerne al la laborista movado. Entute la afero estis bona sukceso kaj efika reklamo por Esperanto. Ĉi certe instigos la laboremon de la Londonaj klubanoj en la Federacio.

E. D. Durrant,  
Informservo de la Brita Esperantista Asocio.

kaj turnas sin al la tutmonda **Esperantistaro, urĝe postulante**, ke ĉiuj unuopaj eminentaj Esperantistoj kaj precipe ĉiuj landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj kune kun UEA (Universala Esp.-Asocio) energiĝu kaj taŭgmaniere kunhelpu, por ke nia en la rezolucioj al la Aŭstria kaj al la aliaj re-

gistaraj dirita peto kiel eble plej bone estu realigata.

La kvar rezoluciojn proponas: Rudolf Michael Frey, vic-prezid. de Aŭstria Esp.-Asocio.

Kiel proponinto de la 4 rezolucioj mi akcentas laŭ interparolo kun generalo

Louis Bastien, Prez. de UEA, ke ĉi tiuj rezolucioj rilata la « Internacian Konferencon en Wien 1938 » estu efektivigataj en sekvo de la « Internacia Konf. 1937 en Parizo » kaj de la « 29a Un. K. de E. 1937 en Varsovio ».

R. M. FREY.

Ĉio unuanime akceptita.



# Idiotoj au Krimuloj ?

*Oni sendis al ni la jenan informon :*

La en Londono aperanta gazeto «The Patriot» publikigas en n-ro 743 la alskribaĵon de anglo, kiu esprimas ke **Esperanto estas disvastigata sole kiel rimedo por la mondrevolucio**. La lingvo (tiel tekstas la skribaĵo) estas propagandata kiel masko por la sukcesigo de revoluciaj ideoj; ĝi aspektas tre senkulpa, tre neŭtrala kaj sendeviga; sed **mi ne scias ion, kio estus pli incita kaj kio pli facile engutus en tiajn lokojn kiel ekz. lernejojn kaj kolegiojn**, kiuj ordinaro ne estas alireblaj por la duonpolitika propagando diseriga. **Malgraŭ la diversaj maskiĝoj la Esperanto-movado, kie ajn oni ĝin trovas en iu mondparto, ekzistas por la sola celo, subfosi la nacian unuecon kaj firmecon.**

\*

Estas ne la unua fojo, ke oni legas en la gazetaro tian artikolon kian la supre resumitan. Kutime oni povas malatenti tiajn sensencaĵojn, ĉar ili tro evidente montras la mensostaton kaj la intencon de siaj verkintoj; sed foje ili «meritas» esti elmetataj je la pilorio kaj esti nomataj per sia ĝusta nomo. Tiam sensencaĵon vere povas skribi nur idioto aŭ — krimulo. **Krimulo li estas, se tian mensogegon li elplumigas kun plena konscio; krimulo eĉ duobla: krimulo je la esperantistoj, kiujn li kalumnias senbezone, el pura ĝojo kalumnii aŭ el fanatika malamo; kaj — krimulo je la homaro kaj je la propra popolo. Jes, krimulo je la bonfarto de la tuta homgento, krimulo je la civilizacio kaj kulturo de nia mondo.** Ĉar, kvankam la ideo de lingvo neŭtrala internacia ja certe iam venkos malgraŭ kaj spite al ĉiuj kontraŭaĝoj, tamen la venko povas esti **prokrastata** per la agoj de tiaj fuŝverkantoj.

Imagu, kiom da idealaj kaj materialaj valoroj perdiĝos al la homaro, se la venko per tiaj kontraŭaĝoj prokrastiĝos nur je unu jardeko, eĉ je nura jaro! Kaj, ĉar ĉiu unuopa popolo same kiel la tuta homaro profitos per la venko de l' internacia lingvo, **ĉiu tia artikolskribanto fariĝas krimulo ankaŭ kontraŭ la interesoj de la propra nacio**, do: **malpatrioto**. Kaj, plua konkludo: **la redakcio de tia gazeto**, kia «The Patriot», kaj de ĉiu cetera gazeto, kiu publikigas similan sensencaĵon pri nia afero, **vole nevole fariĝas kunkulpa kontraŭ la homaro kaj kontraŭ la propra nacio, do, agas**

**ĝuste kontraŭ la sendube bonegaj principoj, kiujn ĝi por sia agado akceptis!**

En sia broŝuro: «Kial Esperanto? Kial Germana Esperanto-Asocio?» s-ro Walther, la eksprezidanto de la eks-GEA, tre prave skribis i. a. : **“Esperanto estas — kiel la gepatra lingvo, la skribo, la libro, la gazeto, la telefono, la radio, la kino — nur rimedo, destinita por servi al la homaro.”** Ĉiu el ĉi tiuj rimedoj oni povas uzi **bon- kaj malboncele. Eĉ la gepatra lingvo ne povas sin protekti kontraŭ misuzo**, ekzemple ĝi ne povas malhelpi ke per ĝi interkonsentas la rabistoj, la murdistoj, la perfiduloj mem de la ŝtato kaj popolo. Ne ekzistas 100-procente efika rimedo por eviti, ke per la gepatra lingvo estu miskondukata tuta popolo, ke per ĝi estu incitata komploto kaj ribelo, per ĝi aranĝata militiro de kalumnio kaj mensogo (ankaŭ kontraŭ Esperanto!). Kaj **la gepatra lingvo utiligas por ĉi tiu misuzado ĉian eblan el la ceteraj rimedoj**: parolon, skribon, telefonon, telegrafon, libron, gazeton, radion, kinon . . . Ĉiu el jenaj rimedoj «aspektas tre senkulpa, tre neŭtrala kaj sendeviga», ĉiu el ili okaze servas kiel «masko por la sukcesigo de revoluciaj ideoj». Kial do oni volus riproĉi sole al la internacia helplingvo, ke **ankaŭ ĝi povas** esti misuzata, kvankam ĝuste ĝi **evidente estas kreita por la plej noblaj celoj** imageblaj, **“destinita por servi al la homaro”?**

Cetere, kiam oni parolas pri «revoluciaj ideoj»: ne ĉiu revolucio estas nepre kondamninda, nek ĉiu revolucia ideo nepre forĵetinda. Ofte, revolucio estas vere necesega por likvidi ne plu eblan staton. Kaj **nur la revoluciaj ideoj antaŭenpuŝas la homaron kaj ĝian kulturon**. Sen ili, kie ni starus hodiaŭ? Ni vivus ankoraŭ en la plej primitiva praepoko. Sed tiuj viroj, kiuj unue disvastigis la ideon, ke ne homo al homo nepre devas esti lupro sed ke ili amu unu la alian; aŭ la ideon, ke ne la suno sin movas super plata tero sed ke, kontraŭe, globforma terostelo sin turnas ĉirkaŭ la suno same kiel multaj aliaj steloj: aŭ tiun ideon, ke ne la homo restu sklavo de sia surtera estado sed fariĝu mastro de sia ekzistado, kreante al si obeemajn robotojn-maŝinojn, kiuj plifaciligos al li la laboron kaj agrabligos al li la vivon; ke ne estas necese ke la homo restu eterne katenita al la tergrundo, sed ke libere kiel la aglo li sin levu en la aeron; **ke ne bezonos homo esti muta al homo el alia nacio sed ke ili interkompreniĝu facile kaj**

**senĝene, kun kristala klareco, per la mirinda rimedo de lingvo internacia**; — ĉiuj ĉi viroj: la Budaoj kaj Kristoj, la Galileoj kaj Kolumboj, la Edison'oj kaj Zeppelin'oj, la Schleyer'oj kaj Zamenhof'oj, — ĉiuj ĉi viroj kiuj kuraĝis elpensi kaj disvastigi vere revoluciajn ideojn, ili estis mokitaj, kontraŭbatalitaj, persekutitaj, alkrucigitaj aŭ bruligitaj; iliaj ideoj, kiom ajn grandiozaj, sublimaj, komence estis rifuzitaj, repuŝitaj, ridindigitaj. Kaj tamen jam venkis la plimulto de tiuj ideoj. Ili konkeris la mondon. Ili fine konvinkis eĉ tiujn, kiuj antaŭe estis iliaj plej akraj kontraŭuloj. Al la geniaj pensuloj oni konstruis monumentojn el ŝtono aŭ en la koroj; iliaj ideoj hodiaŭ estas plene akceptitaj kaj jam alportis senfinan utilon al la tuta homaro. Se okaze ili estis misuzitaj, **la malutilo kaŭzita de la misuzo ne povas elteni komparon kun la grandega utilo, kiun ili efikis, — kun la grandioza progreso, kiun ili alportis al la homgento.**

Aŭ ĉu iu el la nun vivantoj, se ne li estas tute idioto aŭ strangulo, volus malhavi la multajn progresojn de nia moderna kulturo, la mil kaj mil objektojn kaj inventaĵojn, kiuj agrabligas la vivon de l' nuntempa homo, malgraŭ ilia okaza aŭ eventuala misuzo? Ĉu iu el ni serioze povus imagi, ke ni sentus nin feliĉaj, se subite ni estus transportitaj el nia epoko en la epokon de l' Paleolitiko, en la vivtempon de Hamurabi, de Julius Caesar, de Karlo la Granda, aŭ eĉ de Napoleon Bonaparte? La «bona malnova tempo» forpasis, ni vivas en la estanteco, kaj ni ja vivu por nia tempo kaj por tiuj, kiuj post ni venos. Malgraŭ siaj mankoj kaj difektoj, la nuna tempo estas **la nia**; ni nur klopodu ke ĝiaj difektoj kaj mankoj estu forigitaj kiel eble plej baldaŭ, por ke niaj posteuloj kaj, se eble, ankoraŭ ni mem, ĝisvivu epokon kiel eble plej kontentan kaj feliĉan. **Por tiu celo ni uzu ankaŭ nian Esperanton!** Tiam fine ankaŭ mutiĝos la sensencaj atakoj de idiotoj kaj krimuloj kontraŭ nia afero, tiam klarvidos ankaŭ la miskomprenantoj kaj konvinkiĝos la skeptikuloj, — kaj **la homaro, kaj ĉiu unuopa popolo (ankaŭ la angla, ankaŭ la franca, la itala, la japana kaj ĉiu el la ceteraj popoloj sur nia tero), estos pli kontenta kaj pli feliĉa ol nun, ĉar ĉiuj jam estos en la plenposedo de la mirinda rimedo, kiun donis al ĉiuj la genia spirito de D-ro Zamenhof.**

T. J.

## La IVa Kongreso de Administracia Scienco en Varsovio

En la kunsido-salono de la Supera Administracia Tribunalo en Varsovio kolektiĝis antaŭ nelonge ĉirkaŭ dudek ĵurnalistoj por gazetara konferenco, aranĝita de la Kongresa Komitato de la IVa Int. Kongreso de Administracia Scienco.

S-ro Jan Kopczynski, la prezidanto de la S. A. Tribunalo, informis nin pri la kongreso.

La ideo organizi internacian kongreson de administraciaj sciencoj datumas de la jaro 1910, kiam okazis la unua tiuspeca konferenco en Bruselo.

La partoprenintoj de la tiama konferenco venis al konkludo, ke pere de sciencaj rezolucioj oni povas influi la ŝtadadministraciojn por plibonigi multon plibonigendan en la proverba administracio.

Ĝuste tian celon starigis al si la organizintoj de la kongreso; la akceptitaj rezolucioj estis transsenditaj al la registaroj de ĉiuj ŝtatoj. La unuajn kongresojn partoprenis nur kelkaj ŝtatoj, iom post iom la nombro pligrandiĝis, kaj ekzemple nun en Varsovio ĉeestis reprezentantoj el 20 landoj, inter ili ankaŭ Usono.

Tio estas la scienca flanko de tiu temo, sed krome ekzistas ankoraŭ alia flanko, speciale grava por ni Esperantistoj.

Dum la gazetara konferenco mi demandis la prezidanton, *en ĉiu lingvo oni parolos dum la kongreso?* La respondo mi citos tute precize, tiel kiel mi ĝin publike ricevis de la Prezidanto de la Kongreso:

« S-ro redaktoro, rilate la lingvon, ĉiam dum tiaj kongresoj estas ĥaoso (li diris *balagan*, kio signifas eĉ pli multe ol ĥaoso). La lingva demando estas la plej doloriga punkto dum la sciencaj kongresoj (!)... Mi ĉeestis jam multajn int. kongresojn sciencajn kaj ĉie mi observis tiun bedaŭrindan malhelpaĵon.

Fakte ekzistas principo, ke dum la kongreso oni parolas france, angle kaj en la lingvo de la kongreso-lando, sed neniam oni atentis tiun principon, kaj preskaŭ ĉiu nacio uzas sian lingvon, kiu plej ofte estas nekomprenebla por la ceteraj delegitoj... »

Jen voĉo de aŭtoritato. Kaj tiel, vere, okazis ankaŭ en Varsovio. Mi ĉeestis kelkajn kunsidojn de la kongreso kaj mi certigas al vi, karaj gelegantoj, ke nia prezidanto de la Supera Admin. Tribunalo pravis tutplene.

*Rilate la lingvan demandon estis ĥaoso, 20 nacioj estis reprezentitaj, kaj nur iom malpli ol 20 lingvoj, reciproke NEKOMPRENEBLAJ, estis plene uzitaj...*

Henryk Giełb.

## U.D.E.V. en la Kongreso.

La Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj en harmonio kun 48 aŭstria virinsocietoj kunvenis la 12an de aŭgusto en la ceremonia salono de Hofburg kun ĉeestantaro nombriĝanta je proksimume 300 personoj. Estis, verdire, la plej granda kaj plej brila kunveno de la 28a.

Sub la prezido de s-ino Fürtz, parolis germanlingve, s-ino Doktorino Alma Motzko urbkonsilantino, pri la reagoj de l'Ekonomiaj cirkonstancoj en virinajn mediojn: ŝian tre dokumentitan referaton tradukis s-ino Frieda Feichtinger, sekretario de U.D.E.V. en Aŭstrujo.

Poste, parolis tre elokvente, f-ino Lidja Zamenhof pri la temo « Al nova Epoko »: tiu parolado ege varmigis la pacentojn de la ĉeestantaro kiun s-ino Borel, ĝenerala sekretario de U.D.E.V., finante la kunvenon, alvokis sub la verdan standardon de U.D.E.V. por kunlaboradi al starigo de Universala Paco, laŭ kaj per la Zamenhof'aj sentoj — AMO kaj INTERKOMPRENO.

La 14an de aŭgusto multaj virinoj respondis al tiu alvoko partoprenante la fakan kunvenon de U.D.E.V.

Sub la prezido de f-ino L. Zamenhof kiu denove aŭdigis tre altajn pacparoladojn, s-ina Frieda Feichtinger raportis pri la movado en Aŭstrujo esprimante sian ĝojon pri la sukceso de la granda virinkonferenco en kiu U.D.E.V. akcelis grandskale siajn du celojn: 1<sup>o</sup>) Enkonduki Esperanton en la porpacaĵn societojn; 2<sup>o</sup>) varti kaj uzi la internan senton de Esperanto por tio kio ĝin naskis: Interkompreno de la homoj ne nur buŝe sed kore.

Fine Mac Auslam raportis pri la movado kiun ŝi estras modele en Britujo, ŝi memorigis nian bedaŭratan aninon, s-ino L. Blaise por kies memoro la ĉeestantaro pie silentis momenteton.

S-ino Wachmann anstataŭis f-inon Giltay por Nederlando kaj f-ino M. Adamkova gajhumore pledis kontraŭ la viroj kiuj laŭ ŝi, sklavigas la virinojn per la mastrumado. F-ino Zamenhof invitas la virinojn sensklaviĝi ne tiel de la mastrumado kiel de la antaŭjuĝoj por labori diligente kun la viroj al veno de pli bona Estonto. Per entuziasmaj aplaŭdoj finiĝis la kunveno en kiu ĉiuj aninoj promesis multon fari por la bono de nia Afero kaj renkontiĝi en Varsovio!

Atendante la 29an Universalan kongreson, ĉiuj virinoj konsciaj pri la urĝa devo — *labori por Paco* — sinturnu al s-ino M. Borel, I Quai C. Bernard, Lyon, Francujo, kiu volonte donos ĉiujn informojn pri U.D.E.V. kaj sendos specimenon de la ligilo de U.D.E.V. la « Lumturo de Esperanto ».

M. B.

## 9-a Brazila Kongreso de Esperanto

Rio-de-Janeiro — Novembro 1936.

De la 12-a ĝis 17-a de novembro de la nuna jaro okazos la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto, sub la alta patronado de d-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Brazila Respubliko.

*Honoraj prezidantoj:* d-ro Antonio Carlos Ribeiro de Andrade, prezidanto de la Deputitaro Ĉambro; d-ro Gustavo Capanema, ministro de Edukado; d-ro João Marques dos Reis, ministro de Publikaj Laboroj, kaj kanoniko Olympio de Mello, ĉefurbestro de la Federacia Distrikto.

*Honora Komitato:* s-ro grafo Affonso Celso, prezidanto de la Brazila Instituto de Historio kaj Geografio; d-ro Affonso Costa, prezidanto de la Karioka Beletristika Akademio; d-ro Antonio Austregesilo, prez. de la Nacia Medicina Akademio; d-ro Herbert Moses, prez. de la Brazila Gazetara Asocio; prof. d-ro Joaquim Licinio de Almeida, ĝenerala sekretario de la Ministrejo de Publikaj La-

boroj; s-ro José Salgado Scarpia, prez. de la Komerca Asocio de Rio-de-Janeiro; generalo J. M. Moreira Guimarães, prez. de la Geografia Societo de Rio-de-Janeiro; d-ro Laudelino Freire, prez. de la Brazila Beletristika Akademio; d-ro Lourival Fontes, direktoro de la Departamento de Propagando kaj Kultura Disvastiĝo kaj de la Departamento de Turismo de la Federacia Distrikto; Monsinjoro Luiz Gonzaga do Carmo, prez. de la Brazila Filatelika Klubo; s-ro Mansueto Bernardi, direktoro de la Ŝtata Monfarejo; d-ro Mario Teixeira de Freitas, prez. de la Brazila Asocio de Edukado; generalo Pantaleão da Silva Pessoa, prez. de la Ligo de la Nacia Defendo, kaj d-ro Raul Azevedo, regiona direktoro de la Poŝt-telegrafa Departamento.

La prezidanto de la Organizo Komitato estas d-ro Viterbo de Carvalho, direktoro de la Ŝtata Presejo.

# LA GRANDIOZA ERARO

Unutaga flugo super tri kontinentoj . . . kaj Esperanto estas *nedezirata*.

En Germanujo Esperanto nun estas « nedezirata » — per tiu difino la germanaj aŭtoritatoj klarigis la postulon ke la esperantistaj organizaĵoj dissolviĝu kaj ke Heroldo ĉesigu sian aperadon. Ĉu kredinde kiam oni ekscias ke dum unu tago estas farita flugo super tri kontinentoj? Tiun flugon plenumis per sporta aviadilo germana aviadistino Elly Beinhorn (s-ino Rosemeyer). La 6-an de aŭgusto frumatene, aŭ, pli ĝuste: nokte, je 0.20 h. ŝi startis en Damasko (Azio), atingis post 2 1/2 horoj Kairon (Afriko) kaj tie denove startis je 3.40 h. al Ateno. Je 12 h. ŝi startis en Ateno (jam en Eŭropo) kaj daŭrigis sian flugon tra Budapeŝto (tie halto) ĝis Berlino, kie ŝi alvenis je 19.15 h. vespere, trafluginte distancon de 5830 kilometroj entute, el kiuj 950 km. trans la Mediteraneon.

La ĵurnaloj, regnogermaĵoj kaj aliaj, uzis la sensacian okazon por denove paroli pri la interligo kaj interamikigo de popoloj. Kaj tio ja estas vera: neniu sporto, kaj neniu fako de la moderna trafiko, estas tiom predestinita por interligi kaj interamikigi la popolojn kiom estas la aviado. Kion, tamen, utilas la *teknika* interligo de la popoloj, dum ke ilian *spiritan* interligon malebligas la lingvobabelo? La teknikan interligon ĉiel akcelas la aŭtoritatoj, sed la spiritan, la lingvan interligon ili ofte mal-

helpas, dekretante kontraŭ la internacia helplingvo!

Belaj vortoj estas faritaj ankaŭ ĉe la Berlina Olimpiado. « ... ni **volas ekkoni** kaj ekŝati unu la alian kaj per tio konstrui ponton, sur kiu la popoloj de Eŭropo povos interkompreniĝi. » Tion diris la germana propaganda ministro. Aliaj parolis tutsimile. Sed kiel oni povas vere ekkoni kaj ekŝati unu alian, se unu ne komprenas la lingvon de la alia? La Olimpiaj Ludoj en Berlino pli evidente ol ia alia okazo *pruvis* la necescon de internacia helplingvo. Ne unufoje, ne dekfoje, sed cent- kaj milfoje, en ĉiu momento, sur ĉiu paŝo. La germanaj ĵurnaloj sciis sufiĉe raportoj pri tio. La interkompreniĝo dum la Olimpiado estis ofte vera turmento. Ĉio tie estis bonege organizita, funkciis mirinde. Nur la lingvobarojn oni ne sukcesis fororganizi, kvankam la sola rimedo kuŝis preta apude. Sed ĝi estis — « nedezirata ». Kial? Pro superstiĉo, pro antaŭjuĝo per nenio pravigita, pro malemo sin okupi pri ĝi, pro iu neklara timo ke el tiu ideo povos estiĝi io tro grandioza, io kio minacas renversi la klercon kaj la kulturon en pli alta grado ol tion faris antaŭ duona jarmilo la invento de Johano Gutenberg.

Estanteco pruvos ke batalo kontraŭ Esperanto estis nenio krom — grandioza eraro!

## Doktoro Pierre CORRET †

\*

La 7an de aŭgusto 1936 subite mortis en Parizo multjara fervora franca amiko de nia movado, *D-ro Pierre CORRET*, en la aĝo de nur 55 jaroj.

Esperantisto de la frua periodo, li estis ĝenerala sekretario de Societ' franca por la Propagando de Esperanto de 1908 ĝis 1911, kaj membro de la Akademio de post 1920.

Li akiris sian medicinan doktorecon de la fakultato de Parizo en 1908, per la tezo « Utileco kaj ebleco de alprenado de internacia helplingvo por la Medicino », kiun li prezentis kun tre granda sukceso.

Krom tiu tezo aperis el lia plumo: *Raportoj pri la 2a, 3a, 4a kaj 5a Universalaj Kongresoj de Esperanto* (1906-1909), seslingva *Internacia Radio-Leksiĥono* (1925) kaj traduko de la konata verko de Jules Romain *Knock* (1932), kiu estis prezentata dum la XXIVa Universalaj Kongreso en Parizo, en Aŭgusto 1932.

Plie li kunlaboris al diversaj esperantistaj gazetoj, speciale al *Lingvo Internacia*, en kiu li energie kontraŭbatalis ldon kaj ĉiujn aliajn ŝanĝojn kiujn tiutempe la reformemuloj klopodis altrudi al Esperanto.

Same senŝancelan fidelecon al nia senreforma lingvo li manifestis ĝis sia morto, per la malgranda prilingva organo *Zamenhofa Esperanto*, kiun li lastatempe eldonis.

Ankaŭ en *Internacia Scienca Revuo* li skribis, precipe pri radio, pri kiu li estis tre kompetenta. Li elpensis diversajn interesajn aparatojn. Inter liaj eltrovaĵoj speciale menciinda estas la uzado de doma elektra kurento anstataŭ la maloportunaj akumulatoroj. Li kunlaboris al multaj radiofoniaj organoj, estis prezidanto de *Internacia Radio-Asocio* (1924) kaj ĉefredaktoro de *Internacia Radio-Revuo* (1926).

Pere de la radio li interesiĝis ankaŭ pri stenografio, kaj ne plu ĉesis okupiĝi pri ĝi post kiam li eksciis ke la metodo Duployé, kiun li estis ellerninta, estis adaptita al la Internacia Lingvo. Li partoprenis aktive en la starigo de *Stenografista Instituto Tutmonda*, de kiu li estis konstanta komitatano, kaj en la eldonado de ĝia oficiala organo, la revuo *Fluganta Skribilo*.

*Doktoro Corret* sciis kombini tiujn tri manierojn de penskomunikado: la internacian lingvon, la rapidan skribon kaj la rapidan transsendon de novaĵoj, kiuj ĉiuj akcelas la universalan alproksimiĝon de homoj kaj popoloj.

Al liaj parencoj, al liaj multaj amikoj kaj al la organizaĵoj al kiuj li malavare dediĉis sin, ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

## Esperanto-servo por konigi la naciajn kulturojn

Per Esperanto oni havas kontakton kun la tuta mondo; oni havas okazojn kompari kaj komparigi. Ĉiu nacio havas valorojn, kaj oni deziras konigi ilin al la eksterlando, akiri konfidon, estimon al si.

La tasko proponas sin: Konigu la kultuvalorojn de via popolo — sisteme — al la aliaj, kies estimon, justan koncepton, komercan intereson ktp. vi volas vekti! Esperanto ankaŭ ĝis nun jam servis bonrezulte en tiu direkto, sed sistema laboro povus ege pliriĉigi tiujn rezultojn.

Interesa eksperimento okazas ĝuste nun ĉirilate en Hungarlando, laŭ la iniciato de la prezidanto de Hungara Esperanto-Federacio, s-ro József Mihalik. Periode (kvaron- aŭ duonjare) aperos kajeroj, eldonitaj de la Hungara Popolkleriga Komisiono, popularstilaj,

pri la vivo de granduloj en la hungara historio, pri la ekonomia, politika, literatura vivo. Tiuj kajeroj estos dissendataj al la diversaj esperantistaj organizaĵoj kun tiu espero, ke oni legos kaj konigos ilin, ankaŭ ekster la movado, do ankaŭ sur la folioj de la nacia gazetaro. Tiamaniere penetras en la vejnon de eksterlandanoj vera scio pri malgranda nacio, kiun oni konis pli frue nur el kelkaj vortkliŝoj. Tiamaniere Esperanto igus pli irebla la vojon al koro, animo, menso de aliaj popoloj.

Laŭ nia scio, la unua kajero de la interesa serio baldaŭ aperos, kaj estas ege dezirinde, ke eksterlande oni sekvu la utilan ekzemplon, kies ĝenerala sukceso kompreneble multe altigus la utiligebledon de nia lingvo.

F. Szilágyi



# Al la nekonata amiko

Verkis: Noémi Kóbor.

Kara John, la kvina jaro estas, ke ni korespondas kaj nun, la 16-an de januaro 1936, la saman tagon ĉe la sama skribotablo mi skribas al vi, apud kiu mi elektis vian nomon el la nomaro de la Koresponda Klubo, adresis la koverton kaj forsendis tiun pamfletaĉon kontraŭ la vivo, kontraŭ la socio, kontraŭ la senespereco (ĉio per malgrandaj literoj), kion mi skribis en mia abrupte malvarmiganta ĉambro ĉe la lumo de la 16-kandela elektrolampo... Tiu ĉi unua letero estis por neniu kaj por ĉiu. Same mi estus povinta forsendi ĝin kiel gazetartikolon — en preso ankaŭ tio ne estus aperinta kaj mian deziron por komuniki ankaŭ tio estus mildiginta. Sed mi ja estis tiam en malkaŝata ribelo kaj volis aŭdi homan voĉon. Eĉ: eĥon. Kaj ŝajnas, ke de malproksimeco de 3000 kilometroj pli bone aŭdiĝas la voĉo ol el tri paŝoj: je mia senalparola verko mi ricevis respondon en dek tagoj.

Kaj tiam John, vi fariĝis homo el nura adreso, kiun kvazaŭ mi kreis el pura nenio, kiun mi helpserĉante alkaptis.

Mi estas fiero pri vi, John. Kelkfoje mi kredas, ke vi eĉ ne ekzistus, se mi ne estus tiam enpoŝtiginta tiun koverton. Urĝan respondon mi petas: sincere, John, je via vera animo, ĉu vi vivis jam antaŭ la 16-a de januaro 1936?

Neniam ni parolis — mi petas pardonon —, skribis pri nia vivo, pri nia pasinteco. Ĉiam pro la estanteco kaj venonteco amasiĝis niaj zorgoj. Ĉu ankaŭ vi havas pasintecon, kiel ekzemple mi? Tian stultan, simplan kaj tian turmentepezan?

Kaj je via vera animo, ĉu vi estas tiu ŝmirita, ŝminkita dando, kies bildon vi sendis foje al mi (en iu brokata apogseĝo li sidas kaj meditas elegante) aŭ tiu trikotvestita atleto dum florado de sia vivo, kies piedo nur per unu nuanco kurbigas de la rekto (kaj tamen venkis ĉiun eblan pensemon). Ĉu vere vi fotografadis tiujn mil kaj unu pejzaĝojn pri la diversaj mondpartoj de la angla imperio, kie, laŭ via diro, vi vojaĝadas en komisiono de via firmo?

Mi ne kuraĝas inviti vin, John, ke vi venu kaj vizitu min hejme, en Hungarlando. Ni estas tro bonaj geamikoj... sed eĉ unu mi ne ŝatas el viaj bildoj.

Vi estas beleta knabo. Vi estas ĝentilhomo.

Sed mi volas vin, John, nek kiel bel-etan knabon nek kiel ĝentilhomon. Vian voĉon mi volas — kaj precipe, ke vi ne konu min.

Tiu foto, kiun mi sendis al vi antaŭ kvin jaroj laŭ la reguloj de la Klubo, ne

prezentas min. Belega bildo, ĉu ne? Kvazaŭ ardas foje via voĉo, se vi parolas al tiu ĉi bildo. Sed al mi estas grava via egalritma homa parolo, kiun mi aŭdas, kiam vi sinforgese profundigas en la skribadon kaj forgesas la bildon kaj forgesas ankaŭ kun kiu vi parolas, kiam vi metas vian tutan animon en la paperon, John, kiel mi.

Mi ne estas aĉa. Ho, mi kredas, kelkfoje mi estas bela. Kiam mi skribas al vi, mi ĉiam estas bela, mi scias. Ankaŭ maljuna mi ne estas. Kaj mi estas vera knabino, John. Nur tiu ĉi juneco estas jam laciga, kiu tre malrapide forpasas por mi, kaj tiu knabineco, kiun anstataŭ ke oni festenus, oni trovas preskaŭ skandala. Kiam ni komencis korespondi, mi estis en mia dudekkvina jaro kaj devis elekti inter modesta ofico (pensiona posteno) kaj inter pola bankiero, kiu estus akceptinta min kiel amatinon por tri semajnoj kaj promesis ridinde altan finkompenson. Mi elektis la oficon. Ŝajnas al mi, ke tio estis la granda dilemo de mia vivo. Mizere bagatela. Karaktero, heroismo ne trovas lokon en ĝi.

Kaj al mi tio estas la granda okazintaĵo de mia vivo. La aliaj: infanmalsano, modesta familia vivo apud oficista patro kaj mastrina patrino, lernado, kino, knaboj kiuj iom post iom forrestadis pro bona edziĝo, sporto... kaj aliaj kialoj. La vivo estis varmeta al mi, ne donis tiel multe, ke mi povus senti pardonon.

Sed mi estas soifa, John, al la vivo, pri kiu mi sentas, ke ĝi povas esti mirinde bela. Kaj ankoraŭ ne estas malfrue. Ne malfrue — tio estas la turmento. Se jam estus malfrue, eble mi trankviliĝus. Sed la ebleco frenezigas min.

Mi ne scias eĉ, kion mi malfruas. Post kelkaj semajnoj mi estos tridekjara. Tiu ĉi cifero citas bildojn al mi... tiel fremdajn, kiel via brokatseĝa viro, via sportrikota Adoniso. (Konfesu, ke ankaŭ vi ne forsendis viajn proprajn bildojn. Ĉu vi estas malalta kaj diketa, ĉu vi havas iun difekton, pro kiu estas tiel bonaj, saĝaj kaj honestaj viaj vortoj?)

La tridekjara virino en sia hejmo, ĉirkaŭ ŝi la edzo kaj malgrandaj infanoj. Almenaŭ du. La unua ok, la alia dujara.

La tridekjara virino en trenaja, ĝistalie nuda vespertualeto... ĉirkaŭita de siaj amindumantoj.

La tridekjara virino ridetante... tiu ĉi rideto, tiu ĉi trankvila, kvieta rideto de sian lokon kaj valoron konanta virino, tio tentas min.

Ke mi neniam ridetos tiel! Neniam mi kvietiĝos, ne povos koni mian lokon

kaj scii mian valoron.

Sen tiu ĉi rideto mi iĝos tridekjara — kaj poste, tiu juneco, kiu ĝis nun nur ĉiam alproksimiĝis al mi, foriĝos de mi.

Foriros sen tragedioj, kaj neniam mi estis kononta ĝin.

Sociale sento, sociala laboro, panzorgo, panenvio — tiujn mi ĉiujn travivas. Sed ĉiam prete kaj ĉiam kompromise, kun mi mem vere neniam mi povis amikiĝi. De mi mem mi ĉiam nur postulis ion, kutime tion, kion mi ne ŝatis kaj ne volis.

John, ĉu vere estas virinoj, kiuj faras, kion ili emas? Kaj ĉu tio ne estas kulpo kontraŭ la socio? Tiam mia vivo estas peko ĉielenkrianta de tiu epoko kaj de tiu medio, en kiun mi ennaskiĝis. Tiam mia simpla, trankvila, sensensacia vivo estas indigniga tragedio.

Sed mi ne kredas. Ĉiam mi havis emon al tio, ke mi montru tro grandan signifon por mia eta vivo. Kio estas? Vivo de unu eta virino inter multaj. Kaj ankaŭ tio estas naturfenomeno, ke la pezeco kaj signifo de tridek jaroj min ektimigas. Ankaŭ tio estas unu el miaj herezoj: mi scias, ke mi ne rajtas tro taksati min. Sed kiu interesas sin pri mi, krom mi mem? Ankaŭ tio estas dilemo, el kiu mi ne povas elbarakti. Kiel mi aranĝu mian vivon interne-ekstere, se mi ne kuraĝas min kontraŭstarigi — tio estas la bona esprimo: kontraŭ — la aliaj, la ceteraj, la socio, la cirkonstancoj, la sorto?

John, mi devas enlitiĝi, estas la dua horo tagiĝe kaj je la oka mi devas esti en la oficejo en la alia parto de la urbo. Neniam mi povas facile ellitiĝi matene. Ĉiutaga turmento, al kiu mi alkutimiĝis. Ankaŭ el tio mi vidas, ke oni povas kutimiĝi al tio, kio ne taŭgas por ni, sed alsimiliĝi — ne! Ĉu tiu kripleco estus la triumfo de la vivo?

Kara John, tamen ne malkaŝu, se la bildoj ne vin prezentas! Mi petas vin, ne parolu pri vi mem! Restu interesa, mistera, feliĉa kaj homa, John!

Ĉar homa estas la varmeco, la kompreno kaj la feliĉo. Ĉio, kion mi malhavas en tiuj, kiujn mi sendube konas, pri kiuj mi certe scias, ke ili vivas.

Kaj ankoraŭ io: mi amas vin, John. Vi estas la fantomo, kiun mi ĉirkaŭbrakas ĉiu vespere. Ĉu vi scias, kiel malfacile estas esti virino hodiaŭ, John? Kaj kiel bone, ke kun vi mi povas esti virino, sen tio, ke mi devus nei la homon vivantan en mi?

Estas jam dek ses paĝoj. Pli mi ne rajtas skribi — la poŝtkoston mi ne povus kovri. Mi salutas vin do amike.

*El la hungara lingvo tradukis:*  
Sári S. John, Budapest.

# AMPÈRE 1775-1836

# Rido Sanigas

Ni festas nun la datrevenon de la morto de unu el la plej grandaj genioj de la mondo, Andreo Ampère, kaj mi volas hodiaŭ kroniki pri tiu tutmonde konata klerulo, kiu lasis gigantajn heredon al la homaro en la scienca fako.

Andreo Ampère naskiĝis en nia urbo, Lyon, en la jaro 1775. Lia patro, kiu estis komercisto, frue lasis sian negocon por vivi simple kaj modeste en vilaĝo, kuŝanta je 15 kilometroj de Lyon, Poleymieux.

Tie, li mem edukis sian filon, al kiu ĝoje li dediĉis sian tutan tempon, tiom pli ĝoje, ke la infano estis nature dotita de riĉaj kapabloj. Tiuj kapabloj estis tre diversaj, sed tamen ili tre baldaŭ direktiĝis al la matematikaj fakoj. Same kiel en Pascal, tiuj denaskaj kapabloj tre frue evidentiĝis. Oni rakontas, ke la infano estis konstante absorbita en kalkuludoj, kiujn li faris per ŝtonetoj kaj fazeoloj, lia amo por kalkuloj estis tiel granda, ke li foje anstataŭigis siajn karajn ŝtonetojn, kiujn la patrino estis de li forpreninta, por ke li dormu pli trankvile, per kuko, kiun li rompis por tio je multaj pecoj, kvankam lia apetito por ĝi estis forta post tritaga senmanĝa dieto. Tiam li estis nur sepjara.

Kiam li atingis 12 jarojn, li estis jam leginta la ĉefajn librojn pri historio, filozofio, vojaĝoj, ktp. ktp., ankaŭ la 20 librojn de Enciklopedio, folio post folio, laŭvice kaj metode. Lia intelekto estis tiel brila, tiel riĉa, ke sen malordo lia menso entenis multe pli ol entenas mondoj de longe kulturitaj plenaĝuloj.

Cetere tiuj legadoj ne estis por li nur memor-ekzercoj, tute ne, ili vekis en li konsiderojn, kiuj fariĝis la fundamento de lia karaktero, ĉu spirita, ĉu morala, ĉu scienca.

Ekzemplé, la vorto «lingvo» en la naŭa libro de Enciklopedio portis lian penson al la randoj de Eŭfrato al la Babela turo, fama laŭ la Biblio. Li tie imagis la ŝancon de la homoj, tiutempe sin interkomprenantaj antaŭ la konfuzo... kaj li planis reordigi la haoson de la lingvoj per reveno al la prapatraj silaboj, kiujn li ekklasigis; kelkaj Lyonanoj havis en siaj manoj gramatikon kaj vortaron de Ampère, kiu jam deklamis poemojn en tiu ĉi lingvo, tre harmoni-plena laŭ la aŭskultantoj, sed kiun ili ne komprenis, ĉar nur Ampère konis la sencon de la vortoj. Lia entuziasmo restis neforgesebla al liaj amikoj, kiam en vortaro de afrika gento Ampère elkovris lingvkombinaĵojn, kiujn li mem estis elektinta. La sama kialo kondukis lin al granda simpatio por la sanskrita lingvo. Zamenhof devis pli malfrue solvi tiun problemon pri universala helplingvo, ĉar Ampère, kvankam bone komprenante ĝian urĝan neceson, estis ankoraŭ pli altirita al la matematikaj problemoj, por kiuj li estis verŝajne antaŭdestinita.

Li estis dekokjara, kiam li atingis la kulminan punkton de ĉio, kion oni ĝis tiu tempo sciis pri matematiko. De tiam, lia genio tiudirekte haltis.

La famaj okazintaĵoj de la jaro 1789 grave influis je Ampère. La revolucio per siaj ondoj batis la vilaĝon Poleymieux. Lia patro decidis reveni en Lyonon, kie li tuj pro siaj jurkapabloj estis elektita kiel juĝisto. Dum la terura uragano, tiu posteno estis danĝera, la pasioj tro forte ekscititaj ne povis esti bremsitaj. La patro de Ampère pereis sub la gilotino.

Kontraŭ tiuj emocioj la filo reagis per sentimentalaĵ eksplodoj, dum kelkaj jaroj li dronis en poezio, tragedio, kvazaŭ lia tro riĉa naturo, havanta en si la fajron de la genio, devis absolute eksplodi al multaj flankoj, laŭ hazarda direkto.

Li estis 21 jara, kiam tiuj internaj fortoj estis tute arigitaj de amo por fraŭlino Carron, lia kamparnajbarino, kaj en tiu ĉi amo, tre nobla kaj tre forta, la natura delikateco de Ampère fariĝis la bremsilo, kiu majstris lian ardecon.

Pacience, humile, li sin klinis antaŭ la neceso perlabori sian vivon, unue por edziĝi kun tiu,

kiun li tiel amis, due por krei al ŝi hejmon. Por tio li trudis al sia genia naturo la modestan taskon de profesoro en liceo, zorgedevigante sian grandegan intelekton, servi la malgrandan kampon, al kiu li, pro amo, estis limigita.

Per batoj la sorto kelkafoje direktas siajn elektitojn! Kiam Ampère estis kvazaŭ adaptinta sin al sia modesta situacio, tro modesta por liaj grandaj kapabloj, lia edzino mortis, kaj la sekvoj de la tiokaze nekonsoleblaj ĉagrenoj de Ampère estis por li la gvidiloj de lia translokiĝo en Parizon.

De 1805, kiam li alvenis Parizon por profesori matematikon en la altpoliteknika lernejo, ĝis 1836, kiam li mortis, do, en la daŭro de 31 jaroj, Ampère iris de malkovro al malkovro, senhalte, ĝis li trovis la fundamentajn leĝojn de la elektro, el kiuj naskiĝis tiom da mirindaĵoj — transporto de la elektraj fortoj, lumigado de urboj kaj kamparoj, telegrafo, telefono, ĉio tio, kion ni nun ĝuas en la organizado de la moderna vivo, ĉio tio, kion bezonis la homaro por grimpi, por atingi la altgradan civilizacion, kie ĝi staras nun.

Konstatinte la altnivelon de kulturo, kiun moralflanke atingis Ampère, ni devas bedaŭri, ke liaj heredantoj, ni homoj, ne scias ankoraŭ apliki nur al bonfaroj, al bona vivo, liajn eltrovaĵojn. Ni estus, sen tiu devojiĝo, dank' al Ampère atingintaj tiun gradon de vera civilizacio, en kiu ni povus esti vere feliĉaj.

Restas do tiu manko, certe grava, kiun ni mem devas prizorgi.

M. Borel.

## Laŭ melodio amata.

### Lulkanto

(Melodio de Johannes Brahms, «Guten Abend, gut' Nacht».)

*Sur la mola kusen'  
Sub de Dio la ben'  
Kun la dolĉo de lac'  
Nun ripozu en pac',  
Ĝis la suna radi'  
Ree ridos al vi!*

*Sonĝu ĝojojn mil,  
Sonĝu: via lulil'  
Fariĝas ĉiel'!  
Dormu, mia anĝel',  
En feliĉo kaj san'  
Sub de Dio la man'!*  
Karl Vanselow.

### Dia volo

(Melodio de F. Mendelssohn-Bartholdy: «Es ist bestimmt in Gottes Rat».)

*Destin' de Dio volas ĝin,  
Ke devas ni deigi nin  
de ĉio.  
Eĉ la plej karan al la kor',  
Ni devas ĝin redoni for  
al Dio.*

*Ke velki devas ĉiu flor',  
Ke sekvas larmoj kaj dolor'  
al rido,  
Ne plendu tial kontraŭ Di',  
Konsolu vin per tiu ĉi  
konfido:*

*Ke Dio ne forsendas nin  
Sen tio, ke atendas nin  
Malantaŭ nia tera rond'  
Revido en pli bela mond',  
revido.*

Karl Vanselow.

## El kongresraporto.

«La brila fino estis, kiel ĉiujare, la balo en naciaj kóstumoj. Ankaŭ du negroj partoprenis.» (Oni forĝesis aldoni, ĉu ankaŭ kun aŭ sen naciaj kóstumoj; sed fine tio ja estas la sama afero.)

## Rejnlanda.

Dum ŝipekurso sur la Rejno. Oni preterpasas multajn rokojn, ruinojn, kastelojn. Iu pasaĝero demandas la ŝipestron konstante pri la legendoj kaj mitoj koncernantaj ĉiun unuopan rokon, ruinojn aŭ kastelojn.

«Cu jen la Draka Roko?»

«Jes, la plej pitoreska roko de la regiono.»

«Cu ekzistas legendo aŭ mito pri ĝi?»

«Ho jes, multaj; sed la plej kruela estas la legendo pri du geamantoj, kiujn oni vidis suprengrimpi la ĉeriveran flankon de la roko sed neniam reveni.»

«Kaj kio okazis pri ili?»

«Ili malsuprengrimpis la alian flankon.»

## Bavara.

En München. Malgranda knabo plorante staris surstrate, ne trovante la vojon hejmen. Vanaj estis la klopodoj, ekscii de li la nomon kaj loĝejon de la gepatroj. Pli kaj pli laŭte plorsingultis la etulo. Jen iu ekhavis ideon:

«Kien do vi kutimas iri por aĉeti la bieron por via patro?»

Tuj la knabo indikis proksiman restoracion. Tie oni konis lin, kaj tiamaniere oni trovis ankaŭ lian hejmon.

## Dum migrado.

Pripensemulo faris migro-ekskursion. Lia dorso-sako enhavis ĉion, kion brava migranto bezonas: boligitaĵojn, bonan brandon kaj saketon da cigaroj. Subite li sentis ke io ne estas en ordo. Ovoj, brando kaj cigaroj unuiĝis je ĉarma miksaĵo.

«Kion fari en tia situacio?» parolis al si la pripensemulo. «Ĉu la miksaĵon do manĝi, trinki aŭ fumi?»

## Bovino kaj Edzino.

Mortis la bovino de vilaĝano. Pro tio tiom ĉagreniĝis lia edzino, ke ankaŭ ŝi mortis. La najbaroj venis al la vilaĝano kaj esprimis sian kompaton. Ĉe tiu ĉi okazo tri el ili proponis al li, ke li edzinigu iliajn filinojn.

La vidvo diris: «Nun mi vidas ke estas malpli granda malfeliĉo perdi la edzinon ol perdi bovinon, ĉar oni proponis al mi tri novajn edzinojn sed neniun bovinon.»

## Studento.

Pruntedonisto: Vi promesis al mi jam antaŭ unu jaro ke mi estos la unua, al kiu vi repagos.

Studento: Mi plenumis mian promeson: ĝis nun neniun jam ricevis de mi la pruntedonitan sumon.

## La kara Dio.

Patro promenis kun sia fileto Karlo. Dumvoje li renkontis konaton vestitan per frako kaj cilindro. Goje li alvokis lin: «Vi, mia Dio, de kie do vi venas?»

Karlo, reveninte hejmen, diras grave al sia patrino: «Panjo, mi vidis hodiaŭ la karan Dion; li portis nigran redingoton kaj cilindron.»

## Stilistiko.

Super la sonorilo de vendisto oni legis la jenon: «Kiu volas de mi aĉeti komercaĵojn, tiu estas petata sonorigi, de la oka matene ĝis la sepa vespere.»

# LA ESPERANTISTA REKLAMO

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.62 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj po 5 belgaj frankoj aŭ 0.31 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en *Heroldo de Esperanto* kaj *Esperanto Internacia*. Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de *Heroldo de Esperanto*, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).

**Edziĝo.** La 1.10.1936 geedziĝis Kenneth Twinn el Cambridge kun Dorothy S. Atkinson el London. Nova adreso: 287 Mill Street, Liverpool 8, Anglujo. — Koran gratulon!

**Geedziĝo.** La 14-an de okt. geedziĝis s-ro Aart de Visser, Dordrecht, kaj f-ino Gré Ensing, Rotterdam. Plej koran gratulon!

**Geedziĝo** samideano Ludrik Berchtold kaj samideanino Manjo Rotteova en ĉeĥoslovaka esperantista somerrestadejo **Lazne Belohrad**. Sinceran gratulon.

**Danko.** Plej koran dankon ni diras al gesamideanoj **Vink** en **Scheveningen**, pro ilia eksterordinara komplezo kaj aktiva helpo, per kiu ili faciligis nian transloĝigon al nia nova hejmo kaj evitigis al ni multajn embarasojn. T. kaj A. Jung.

**Mi serĉas korespondantojn** en Italujo, Francujo, Belgujo, Anglujo kaj Svislando, kiuj deziras interŝanĝon de poŝtmarkoj laŭ katalogo Senff. Martin Lötsch, Zietenstr. 3, II., bei Renert, **Chemnitz**, Germanujo.

**Japana Inform-Agentejo** serĉas konstantan korespondanton ĉiulande, kiu kapablas doni ĉiuspecajn manuskriptojn kaj objektojn pri siaj lando, popolo kaj kulturo, eventuale en potencaj lingvoj eŭropaj. Rekompenco garantiata mone aŭ objekte. Turnu vin al P. O. B. 34, Tennozi, **Osaka**, Japanujo. (362)

**Kvina volumeto de «Tra Mistera Oriento»** sendata kontraŭ unu respondkuponon; «Edzeĉa vivo» kontraŭ unu respondkuponon. Stjepan Mišak, **Adana**, Turkujo.

**Deziras korespondadi** poŝtkarte s-ro Abdul Malik E., 22-jara, prezidanto de Selebese Esperanto-Asocio, Landrente-Kantoor, **Makassar**, Indonezio (D.E.I.), kaj f-ino Sitti Ebong, Onderwijzeres, 18-jara, Bonthain, **Makassar**, Indonezio (D.E.I.). Respondo garantiata.

**Letervespero.** Ni aranĝos letervesperon la 11-an de novembro 1936 kaj petas samideanojn eksterlandajn multnombre skribi al ni. Ni antaŭgarantias respondon. Odder Esperanto-forening, **Odder**, Danlando. (363)

**Poŝtmarkaj kolektantoj!** Mi vendas kaj interŝanĝas bulgarajn kun fremdlandaj poŝtmarkoj. Nikola Iliev, «Zelenka» 12, v. **Tirnov**, Bulgarujo. (361)

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj. F-ino Inga Bersselius, **Eksjö**, Svedujo.

**Ni deziras korespondi** kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Respondo garantiata. S-ro kaj s-ino Schuurwegen, 3 Avenue Reine Elisabeth, **Liège**, Belgujo.

**Poŝtmarkinterŝanĝo** laŭ Michel aŭ kvanto por kvanto. Al ĉiuj certe respondos. J. Limbeck, **Budapest**, VII. Hernád-u. 14. III. Hungarujo.

## LEO MOREAU, ARNHEM

ne plu loĝas: Esperanto-Domo, sed

«**Nia Hejmo**», **Velperweg 90c**, **ARNHEM**, Nederlando.

**Urĝas.** Angla vidvo (soleca) serĉas Nederlandaninon, aŭ alian, 30-40 jaran, por prizorgi mastrumon en moderna domo. Tre komforta hejmo. Iometa scio, aŭ emo lerni anglan lingvon estus avantaĝo. Ofertoj pri rekompenco ktp. tuj al G. Bury, «Montkresto», Breeze Hill, **Liverpool 20**, Anglujo.

**Interŝanĝas** poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. W. Weimark, S. Stenbocksgat. 119, kaj E. Rasmussen, Kristinegat. 15, **Helsingborg**, — Svedujo.

**Ni letervesperos!** Esperantistoj ĉiulandaj, sendu leterojn, fotografajojn, bildkartojn ktp. al nia prezidanto: S-ro L. S. Swart, **Oudebiltzijl** (Fr.), Nederlando, antaŭ 15 novembro. Ni respondos!

**Filatelistoj!** Mi interŝanĝas poŝtmarkojn (precipe kun Anglujo, Svedujo, Ameriko), laŭpece kaj Michel. Hans Arlt, **Friedland i. B.**, Gerichtsgass 11, Ĉeĥoslovakio.

**Ĉarma fraŭlino** serĉas iun ajn okupadon en eksterlando, prefere en Sudlando. Scipovas anglan, francan, germanan kaj esperantan lingvojn. Leterojn bonvolu sendi al F-ino E. R., Esp. Societo, Rŭa 76, **Pärnu**, Estonio.

**Diversaj gesamideanoj** de la Wormera Esperanto-klubo deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per leteroj, bildkartoj aŭ interŝanĝadi p.m. Skribu al: G. Duits, Zaandammerpad 17, **Wormer**, Nederlando.

Bonvoli sendi al **Brazila Ligo Esperantista** esperantistojn por la ekspozicio, kiun ĝi intencas fari okaze de la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto okazonta dum la monato Novembro nunjara. Adreso: Av. Marechal Floriano, 212, **Rio de Janeiro**, Brazilo.

**Poŝtmarko kun teksto en Esperanto.** Kiu sendos al Brazila Ligo Esperantista — Av. Marechal Floriano 212, **Rio de Janeiro**, Brazilo — du respondkuponojn (en Brazilo 1\$000), ricevos en fermita letero du neuzitajn poŝtmarkojn kun teksto en Esperanto.

**Internacia Katolika Informejo.** — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus**, sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, **Oss**, Nederlando. (310)

**Tri junaj**, danaj terkulturistoj deziras korespondi kun gesamideanoj. **Harald Holm Glerup** (20-jara), **Anders Bundgaard** (21-jara), **Jens Christensen** (15-jara), **Aarslev Mark** pr. **Randers**, Danlando.

**K-do A. Sidorov**, Sredne-Smolenskaja ul. 28, **Voronej**, Sovet-Unio, deziras korespondadi pri literaturo, ricevi esp. gazetojn kaj esp. eldonaĵojn.

**Granda Letervespero:** okaze de la dekjara jubileo de nia grupo je la 25.11.'36. Ni certe respondos ĉiujn. Sekretario: J.F.C.M. Dercks, Antwerpschestraat 43, **Bergen-op-Zoom**, Nederlando.

**Houston, Texas, Usono.** Esperantista asocio de universitataj kaj altlernejaj gestudentoj, dezirante propagandi kaj disvastigi Esperanton, petas la tutmondan geesperantistaron helpi al ĝi prepari ekspozicion de Esperanto. Ankaŭ deziras korespondadi per leteroj kaj interŝanĝi bildpoŝtkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj. Pro ĉiu senditaĵo ni dankeme respondos certe kaj senprokraste. **La Houstona Esperanto-Asocio**. Sekretarioj: F-ino Lucy Love (Sam-Houston Altlernejo), 310 Cosmos Street. F-ino Clara Louise Saner (Filatelista Grupo), 2221 Morse Street. F-ino Frances Love (Rice Institute), 310 Cosmos Street. S-ro Moseo Rudy (Rice Institute), 412 McKinney Avenue. S-ro Frank Summers (Universitato de Houston), 2612 Helena Street. Ĉiuj **Houston, Texas**, U. S. A.

S-ro **Charles Neat**, 14 Grosvenor Terrace, **York**, Anglujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, ĵurnalojn kaj gazetojn tutmonde. Nepre respondas.

**Studento** deziras korespondi kun gekolegoj kaj aliaj gejunuloj en tutmondo (pref. Sovetio). Henry Rasmussen, Studenterkollegium II **Aarhus**, Danlando.

**Kontraŭ** nura leterafranko mi transprenas la korektadon de viaj skribaj ellaborajoj. Kune kun interesaj sugestoj kaj konsiloj vi ankaŭ ricevos mian periodaĵeton: «Tutmonda leterkesto». Carl Franzmann, Esp.-verkisto, **Groesbeek apud Nijmegen**, Nederlando.

**Atentu!** Esp.-redaktejoj! Esperanto-verkisto proponas sian kunlaboradon. Plej moderna formo, simpla stilo, Ekskluzive originalaĵoj; ne nur lingve, sed ankaŭ enhave interesa. Honorarion ne postulata, atesto-ekzemplero sufiĉas. Carl Franzmann, Esp.-verkisto, **Groesbeek apud Nijmegen**, Nederlando.

**Lernejanaj** 12-14 jaraj deziras korespondantojn en ĉiuj landoj (neanglalingvanoj). F-ino E. Briggs, North Brisbane Intermediate School, **Brisbane**, (Aŭstralio).

S-ro **E. Kyöstilä**, **Särkisalo**, Finnlando. Popollernejinstruisto deziras korespondi kun la esperantistoj eksterlandaj poŝtkarte aŭ letere. volas ankaŭ ŝanĝi leteretojn de la lernant(in)oj.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S.  
Antverpeno — Belgujo.

